

ESPERANTO



Universala Esperanto-Asocio (en konsultaj rilatoj kun UN kaj Unesko)


**Starigis Koalicio
por Internacia
Lingvo**



**Estrara Raporto
1996**



**Membraro
de UEA:
Kion kaŝas
la ciferoj?**



Defio: levi la idean nivelon

Enhavo

- 101 Kampanjo 2000: Ni gajnas aliancantojn ĉe Unuiĝintaj Nacioj (Mark Fettes)
- 102 Ĉu preparitaj persvadi la mondon? (Detlev Blanke)
- 103 Pluaj ĉhoj
- 104 Kongresoj: Zagrebo kandidatas por la UK en 2000 (Spomenka Štimec)
- Estrara Raporto: UEA en 1996*
- 105 Ĝeneralaĵoj: Stabilaj strukturoj
- 106 Administrado: CO glate rotacias
- 107 Financo: Fruktoj de celkonscia mastrumado
- Kongresoj: Kompleta mobilizo
- 108 Revuoj: De Zamenhof ĝis Zaratuŝtro
- Eksteraj rilatoj kaj informado: Promesplenaj novaj dimensioj
- 110 Landa kaj regiona agado: Ĝemela helpo interlande
- 112 Junularo: Kun sufiĉa fido antaŭen
- 112 Instruado: Inventemaj investoj
- 113 Kulturo: Jaro de teatro, vortaroj kaj tradukoj
- 114 Lingvo, esploro kaj dokumentado: Stimuloj lingvopolitikaj
- Faka agado kaj scienca aplikado: Novaj servoj lanĉitaj
- 115 Financaj aldonadoj
- 117 La membraro de UEA: Falo aŭ stabileco? (Aleksander Korĵenkov)
- 117 Junularo: IJK por duonmilo?
- 118 Laste aperis; Fake
- 119 Esperanto en radio: Internaciaj radioelsendoj en Esperanto (OSIEK-AERA); Muzika konkurso (Andreo Pettyn); Lokaj iniciatoj; Ondoj tra l' mondo
- 120 Nekrologo: Jaroslav Mařík (1913-1997)

Vi trovos

la temojn de Kampanjo 2000 daŭre en fokuso: Detlev Blanke cerbumas pri manieroj levi la idean nivelon de la esperantistaro (p. 102-103). “Unu el la plej gravaj aspektoj de Kampanjo 2000 estas ke la E-movado mem trovu aliancantojn” — memorigas Mark Fettes (p. 101), ĵus aginta tiucele en Novjorko.

Aleksander Korĵenkov statistike analizas (p. 117) la malkreskon de aligitaj membroj de UEA en la pasinta jardeko. Kvankam la tabelo pri Esperanto en radio ŝoviĝis numero-finen (p. 119), ni saluti en elstara loko la 75-an datrevenon de la unua E-lingva radio-elsendo en Newark, Usono (afabla atentigo de Valeria Cvetkova, delegito pri historio de radio).

Fine, lastmomenta informo: reviziante pli fruan rekomendon ĉesigi la formalajn rilatojn inter UEA kaj Unesko, ĉi ties Ĝenerala Sekretario Federico Mayor proponas al la Plenumkomitato de Unesko starigon de operaciaj rilatoj kun UEA, kiu “faras gravan laboron disvastigante la mesaĝon de Unesko kaj antaŭenigante ĝiajn idealojn”.

La kovrilo: Levisto Pyrros Dimas sukcesas superkapigi la halteron. Ĉu pli facilas “levi la idean nivelon de la Esperanto-komunumo”?

ESPERANTO

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio
(en konsultaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Aperas monate (escepte de aŭgusto).
Redaktofinio: la 10-a de la antaŭa monato. **Fondita** en 1905 de M. P. Berthelot (1881-1910). **Establita** kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920). **Legata** en 115 landoj. **Voĉlegata** por blinduloj.

Redaktoro: István Ertl.

Abonprezo: varias laŭlande (NLG 61; USD 35; DEM 55; JPY 4320; ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-suba adreso. Unuopa ekzemplero kostas 5,50 guldenojn.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 2000, 1/2 p. 1100, 1/4 p. 600, 1/8 p. 330, 1/16 p. 180. Movada rabato 50%. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Manuskriptoj: Se eble, akompanataj de komputila disketo 3,5-cola.

Adreso: Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: +31-10-436-1044.

Telefakso: +31-10-436-1751.

Elektronika poŝto: uea@inter.nl.net.

Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.

Banko: Bank MeesPierson, Postbus 749, 3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝir-konto: 37 89 64 (Den Haag).

Kreditkartoj: 

Ĝenerala Direktoro: Osmo Buller.

Direktoro de la CO: Pasquale Zapelli.

Estraro de UEA

Prezidanto (kunordigo, eksteraj rilatoj): prof. Lee Chong-Yeong, Shinsegae Town Apt. 5-1001, Soosung-Dong, Taegu 706-031, Korea Respubliko; ☎+82-53-950-5425 [of], +82-53-765-0880 [h]; ☎+82-53-950-6247 [of], +82-53-765-0881 [h]; ✉lee@esperanto.net.

Vicprezidanto (landa agado: Okcidenta Eŭropo, Ameriko, Afriko; edukado, kulturo): s-ino Renée Triolle, 4, impasse des Charpentiers, FR-57100 Thionville, Francio.

Ĝenerala Sekretario: s-ino Michela Lipari, viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio; ☎+39-6-39-72-61-98; ☎+39-6-39-72-61-69; ✉mc8750@mcclink.it.

Estrarano (financo, administrado): d-ro Fred de Geus, Kerkhoflaan 9, NL-7913 VV Hollandscheveld, Nederlando; ☎+31-528-341214 [h], +31-50-3613769 [of]; ☎+31-50-3613763 [of]; ✉A.F.de.Geus@anest.azg.nl.

Estrarano (eksteraj rilatoj, CED): s-ro Mark Fettes, 158-A Henderson Ave., Ottawa, Ont., Kanado K1N 7P6; ☎+1-613-565-9282; ☎+1-613-565-9279; ✉mfettes@magi.com.

Estrarano (landa agado: Orienta Eŭropo, Azio, Oceanio): s-ro Povilas Jegorovas, ab.k. 167, LT-3000 Kaunas, Litovio; ☎+370-7-739776 [h], +370-7-209781 [of]; ☎+370-7-228616 [of].

Estrarano (faka kaj scienca agado; lingvo): prof. Amri Wandel, 767 Makabim, IL-71908 Israelo; ☎+972-8-264462 [h], +972-2-658-6860 [of]; ☎+972-2-658-4437 [of]; ✉amri@vms.huji.ac.il.

Ni gajnas aliancanojn ĉe Unuiĝintaj Nacioj

De post la fondo de Unuiĝintaj Nacioj, multaj esperantistoj atendas ke ĝi ekokupiĝu ankaŭ pri la lingvaj problemoj de la mondo. Tamen la lastaj kvindek jaroj klare montris ke tio ne okazos aŭtomate.

Nur se la Esperanto-movado mem trovos aliancanojn kaj celkonscie, pacience kampanjos por tia celo, ekzistos iu ŝanco ke tio realiĝos. Jen unu el la plej gravaj aspektoj de la proponita Kampanjo 2000.

Promesplenan novan etapon en tiu agado enkondukis la semajno de 5-9 majo, kiam UEA patronis tri diversajn aranĝojn ĉe la UN-sidejo en Novjorko. Unu estis ero en la jam alte taksata serio de Konferencoj pri Lingvo kaj Komunikado, kiu ĉi-jare traktis la tre diskutigan temon “Lingvaj rajtoj kaj respondecoj”; alia estis novspeca seminario por neregistaraj organizaĵoj (NRO-j), kiu samtempe rolis kiel la fondkunveno de inform- kaj lobi-cela Koalicio por Internacia Lingvo. Trian dimension alportis la diplomatado de UEA-prezidanto LEE Chong-Yeong ĉe diversaj ŝtataj misioj, cele al entagordigo de “International Auxiliary Language” (“internacia lingvo” laŭ la esperantista koncepto) ĉe la Ekonomia kaj Sociala Konsilio de UN (Ekosoko).

Ekosokaj diskutoj

Oficialan peton al Ekosoko diskuti la signifon de internacia lingvo jam pasintjare deponis Transnacia Radikala Partio (TRP) ĉe la Ekosoka Komitato pri NRO-j. La Komitato, konsistanta el 19 ŝtataj reprezentantoj, kunsidis dum 5-9 kaj 12-16 majo por trakti tre ampleksan tagordon. Lee partoprenis la kunsidon dum la unua semajno, kiam evidentiĝis ke la peto de TRP traktiĝos nur poste. Dume, Lee aktive lobiadis ĉe 11 membroj de la Komitato, i.a. Bulgario, Ĉinio, Kubo, Rusio kaj Usono. Tian agadon en la dua semajno efike daŭrigis UN-representanto de TRP, Marco Perduca. Fine, traktado de multaj tagorderoj, i.a. tiu de TRP, estis tamen prokrastita al venonta kunsido.

Montriĝis ke pli facila vojo estus persvadi kelkajn ŝtatojn-membrojn de UN rekte skribi al la Ĝenerala Sekretario pri la neceso de tia tagordero. La lobiado en Novjorko jam metis solidan bazon por tia paŝo.

Koalicio fondiĝas

Por antaŭenigi la internacian diskuton pri lingvaj problemoj, UEA kaj TRP kunlaboris ankaŭ por la fondo de neformala Koalicio de Neregistaraj Organizaĵoj por Internacia Lingvo. La invitletero, kiu portis la nomojn ankaŭ de Bahaa Internacia Komunumo, Mondfederisma Movado kaj Templo de Interkompreno, dissendiĝis al ĉ. 500 adresoj.

La inaŭgura seminario de la Koalicio okazis en Novjorko la 8-an de majo, kun reprezentantoj de ok NRO-j. La kadrano temon, “Kiel alfronti la lingvan krizon: Roloj por NRO-j kaj por UN”, enkondukis Mark Fettes (UEA) kaj Allan Wynne Jones (prezidanto de Eŭropa Buroo por Malpli Uzataj Lingvoj). Ambaŭ substrekis la bezonon de vasta publika diskuto pri lingvaj problemoj kaj de kampanjo informa kaj eduka por ligi la konservadon de lingva kaj kultura diverseco al la konstruado de paco. En la diskuto (kiun partoprenis i.a. Jozefo Truong, TEJO-representanto ĉe UN) aperis pluraj konkretaj proponoj:

- eldoni novaĵleteron nome de la Koalicio, kiun ricevu reprezentantoj de NRO-j kaj ŝtatoj ĉe UN kaj aliloke;

- serĉi manieron kunlabori kun organizaĵoj por minoritataj lingvoj;

- antaŭenpuŝi la debaton pri lingvaj rajtoj kadre de la Ekosoka Subkomisiono pri Rajtoj de Minoritatoj;

- agnoskigi la dimensiojn de la lingva problemo kadre de Ekosok-debato, kun subteno de kelkaj ŝtatoj plej aktivaj pri problemoj de malegaleco (ne nur lingva).

La poŝtadreso de la Koalicio troviĝas ĉe la TRP-oficejo en Novjorko, sed esperantistoj bv. turni sin al Mark Fettes (vd. kolofonon) kun eventualaj demandoj aŭ proponoj pri kunlaboro.

Pri lingvaj rajtoj, diversangule

La du menciitajn iniciatojn trafe apogis la ĉi-jara konferenco de Centro de Esploro kaj Dokumentado (CED),

kiu same kiel pastintjare gajnis la aŭspicion de la Novjorka oficejo de Unesko. Ties vicestro, Andrew Radolf, enkondukis la temon “Lingvaj rajtoj kaj respondecoj” per tre klara kaj senkaŝa prezento de la diversaj problemoj kiujn Unesko spertas sur la kampo de minoritataj rajtoj. Simile honesta estis la prelego de d-rino Purificación Quisumbing, ĉefo de la Novjorka Oficejo de la Centro por Homaj Rajtoj, kiu mem, kiel filipinano, bone konas la vastajn dimensiojn de la lingva problemaro por ordinraj homoj. Ambaŭ invitis la konferencon prezenti rekomendojn al UN kaj Unesko.

La socian, politikan kaj moralan bazon de lingvaj rajtoj kaj respondecoj pritraktis Mark Fettes (Universitato de Toronto), d-ro Jonathan Pool (Esperantic Studies Foundation), d-ro D.M. Provine (Univ. Syracuse) kaj monsinjoro Carl Marucci (Unmisio de Vatikano). Pli institucian perspektivon prezentis Ngonlardje-Kabra Mbaidjol (vicĉefo de la Novjorka oficejo de la Alta Komisiito por Rifugiitoj, kiu tamen malmulte menciis lingvon) kaj Allan Wynne Jones (kiu esperas krei tutmondan reton de organizaĵoj por minoritataj lingvoj, profitante la spertojn de sia Eŭropa Buroo).

Evelyn Moggio-Ortiz, hispanlingva interpretisto ĉe UN, alportis tre bonvenan spicon al la programo per interese filmo pri la historio de interpretado. Sekvis kontribuoj de Sergei Tkachenko (ruslingva interpretisto, kiu parolis elokvente sed ne plenoptimisme pri la renaskiĝo de la ukraina lingvo), d-ro Ron Glossop (Univ. Southern Illinois, kiu same elokventis pri Esperanto), kaj d-ro Timothy Reagan (Univ. Connecticut), kies tre interesan analizon pri la lingvaj rajtoj de surduloj laŭtlegis Humphrey Tonkin. Kelkajn pensojn pri la interligoj inter diversaj programoj prezentis Kurt Müller, plurjara kunlaboranto de CED kaj ĉefredaktoro de du volumoj pri antaŭaj konferencoj.

(daŭrigo sur p. 104)

Ĉu preparitaj persva

Elstara movada figuro, interlingvisto kaj komitatano, Detlev Blanke kontribuas al la diskuto pri Kampanjo 2000 per pensoj pri la levenda idea nivelo de la E-komunumo.

1. Utile substrekiis prezidanto prof. LEE Chong-Yeong kaj Renato Corsetti (apr., p. 62), ke la teksto pri Kampanjo 2000 ne estas definitiva. Ĝi ja invitu al diskuto.

Mi, ekzemple, ne trovas nin sufiĉe preparitaj por kuraĝe prediki novan internacian lingvan ordon, ĉar ni kondukas kvazaŭ nia oferto estus tute klara kaj la mondo nur tro stulta por akcepti ĝin. Tamen, multo en nia oferto tute ne estas klara, kaj ni devas pli zorge analizi la realajn bezonojn (en Eŭropo, UN, Unesko k.a.) kiujn ni volas kontentigi! Mi krome miras ke la Strategia Plano de 1989 jam preskaŭ ne rolas en la debato kaj pro tio mi bonvenigas la reatentigon de Humphrey Tonkin (jan., p. 2) pri la dokumento.

2. Mi klopodas iom — kaj certe tute nesufiĉe — cerbumi pri elemento de la unua ĝenerala celo de la kampanja plano, pri la “idea nivelo de la Esperanto-komunumo” kaj pri tio kiel ĝin levi. Malfacila afero. Mi devus a) scii kio estas la “idea nivelo” kaj b) konscii ke (kaj kial) ĝi ne sufiĉas por realigi “niajn” grandajn planojn, do ĝi estas levenda.

Mi skribis pri “niaj” planoj. Jen tuj la demando: kiu estas “ni”? Ĉu la Estraro, la Komitato, ĉiuj membroj de UEA, la “cetero” de la Esperanto-komunumo? Kaj kio estas la ideoj kies nivelon ni volas levi?

Eble sub “idearo de la Esperanto-komunumo” oni povus kompreni la tuton de *scioj, supozoj, konvinkoj, mitoj, kredoj, idealoj kaj esperoj* ligitaj al la monda lingva problemo kaj ties solvo, al planlingvoj ĝenerale kaj speciale al Esperanto (lingvo kaj lingva komunumo), al ĝiaj strukturo, funkcioj, esprimkapabloj, aplikoj, kulturo, historio kaj estonteco.

3. Se tiel kompreni pri la “ideoj”, laŭ mi ŝajne ekzistas relative forta kontraŭdiro inter la “idea nivelo” de grandaj partoj de la Esperanto-komunumo kaj la realismo de la planoj akceptigi Esperanton kiel interkomunikilon en diversaj medioj. Anstataŭ prepari nin mem pli cel- kaj problem-konscie por eventualaj proponoj, ni supertaksas niajn proprajn eblojn kaj subtakso la danĝeron de fiaskoj, venantaj el ne sufiĉe preparitaj, antaŭtempaj ofertoj kaj intervenoj.

4. Rezonante pri tio kiel eventuale levi la ĝeneralan idean nivelon de la Esperanto-komunumo, mi vidas neceson pensi i.a. pri jenaj ŝanĝindaj aferoj:

4.1. Regas mitoj pri la lingvo mem (simpla 16-regula gramatiko, logikeco kaj senescepteco de la lingvo, samevoluinteco aŭ eĉ supereco kompare kun etno-lingvoj k.s.). Oni pli sobre, pli aktuale kaj pli diferencigante analizu kaj



Aranĝoj kiel la tradicia Tutlanda Kunloĝado en Japanio certe kontribuas al la levado de la idea nivelo.

prezentu la lingvon, por konscii pri ĝia vere atingita evolunivelo kaj pri tio kio estas farenda kaj stimulenda.

4.2. Ekzistas mitoj pri la Esperanto-komunumo. Ekz. Zlatko Tišljar (apr., p. 69) konceptas la esperantistaron tre homogena. Laŭ li “. . . la adeptoj adoptis la grupan kredon (t.e. la internan ideon), kiun . . . efektive difinis la ‘popolo’.” Nu, laŭ mi li malpravas. Fakte la popolo kun la “kredo” neniam ekzistis, hodiaŭ eĉ malpli ol iam ajn antaŭe. En la lingvo-komunumo ekzistis kaj ekzistas diversaj grupoj kun diversaj konceptoj kaj kredoj. Multas kaj diversas la motivoj por lerni Esperanton, por ĝin apliki kaj por forlasi la movadon aŭ resti en ĝi. Sekve ni pli konsciu pri la heterogeneco de la “popolo”, pri la ekzisto de diversaj celgrupoj, kiuj nepre postulus malsaman traktadon, sekve diversajn strategiojn.

4.3. La lingvo-komunumo nur malsufiĉe allogas intelektulojn, ĝi ofte eĉ forpuŝas ilin. Intelektulajn interesiĝantojn ĝi ofte ne sufiĉe kapablas teni. Se ĝi ja tenas ilin, tiam la komunumo ne kapablas adekvate aktivigi ilin. Ekzistas ekzemple tuta aro da elstaraj lingvistoj, kapablaj politologoj, historiistoj, juristoj, ekonomikistoj kaj alifakuloj kiuj apenaŭ aŭ nur ege malofte aplikas siajn ĝisdatajn fakajn sciojn serve al Esperanto por produkti spiritalajn valorojn. Tio aparte validas por la fakaplika sfero. Nenion kontraŭ bonaj poemaroj kaj romanoj (ĝenerale tro laŭdataj kaj maltro vendataj), sed ili ne estas forta argumento, se la faka leksiko restos tiom subevoluinta kiom ĝis nun. Do, necesus pli celkonscia aktivigado, utiligo kaj kunordigado de la intelektaj fortoj de la lingvo-komunumo.

4.4. Mankas konscio pri prioritatoj. Laŭ mi prioritata estus la *interna* fortigo kaj plialtkvalitigo de la lingvo-komunumo, kiujn mi i.a. resumis per la koncepto de interna lingvo-politiko (majo ’96, p. 89), postulo prave inkludigita (sub la dua celo) en la kampanjo-dokumenton.

di la mondon?



Foto: TAHIRA Masako

4.5. Ofte mankas distanco al la propraj kapabloj. Ne ĉiam kompetenteco estas ligita al agemo kaj inverse. Tro da esperantistoj opinias sin preparitaj kaj kompetentaj por ekrilati kun naciaj kaj eŭropaj parlamentanoj, kun Unesko, kun ĉefministroj, eminentuloj kaj influuloj, por ilin persvadi pri la bonoj de Esperanto. Aparte kuraĝaj — kaj danĝeraj — estas tiuj kiuj nur supraĵe kontaktis Espe-

ranton sed tuj volas enkonduki ĝin ien ajn (kp. la dubindajn aktivecojn de la Radikala Partio). Tro ofte per tio ili — kompreneble neintence — helpas detrui la prestiĝon de la lingvo. Lige al tio, kun maltrankvilo mi legas ekzemple en *El Popola Ĉinio* (1/97, p. 9) la tre ĝeneralan alvokon de nia prezidanto ke oni skribu al landaj reprezentantoj de UN, eŭro-deputitoj k.s. “pri la bezono kaj praktika ebleco de internacia helplingvo kaj petu subteni la proponon studi, provuzi kaj provinstrui Esperanton kiel internacian pontlingvon”. Ĉu tion oni ne prefere lasu al kompetentaj aŭtoritataj instancoj, komisionoj aŭ laborgrupoj? Kion fari se oni akceptus tiajn proponojn? Programita fiasko! Ripari mispaŝojn ja ofte pli fortorabas ol novkonstrui. Krome min ĝenas la esprimo “helplingvo”.

5. La idean nivelon ni povas plialtigi nur se ni konscias pri la tuta gamo da sciencaj ekkonoj kaj materialoj ligitaj al la “idearo” (kp. sub 2.). La ĉefajn ekkonojn de tio oni devus instrui en ĉiu lingvo-kurso, ili devus adekvate reflektiĝi en la lerniloj. Kleriga sistemo, sur nacia kaj internacia niveloj kaj kadre de kiom eble plej multaj aranĝoj, devus oferti al la membroj de la komunumo adekvatajn superrigardajn sciojn. Eventuale necesus kompili iun sciencnivelan, elektronike daŭre aktualigeblan kaj facile legeblan enciklopedieton pri la tuto de la scioj ligitaj al 2. Tiu enciklopedieto estu kolektiva verko de ekspertoj kaj enhavu ne nur faktojn sed ankaŭ taktikajn kaj metodologiajn informojn (kaj avertojn), por plialtigi la nivelon de la kontaktado kun la neesperantista mondo.

Detlev Blanke (Germanio)

Pluaj eĥoj

Ni daŭrigas la superrigardon (majo, p. 83) pri la iniciatoj ligitaj al la Manifesto de la E-movado kaj Kampanjo 2000.

La Manifesto kolektis ĝis la 20-a de majo 7482 subskribojn. La kolektado de subskriboj plu daŭras. Kartojn por 4 nomoj kaj foliojn por 20 nomoj oni povas senpage ricevi de UEA. Krome oni rajtas kopii ilin kaj represi ekz. en landaj kaj lokaj gazetoj kaj bultenoj. La Informa Fakto de UEA disponigas tradukojn en 27 lingvoj laŭ peto. Elektronikaj variantoj en pluraj lingvoj estas legeblaj en la TTT-paĝo de Sveda E-Federacio: <http://www.esperanto.se/>.

La E-grupo de Mantova (Italio) transdonis la tekston de la Manifesto de la Esperanto-movado al la konsilioj de la urbo kaj la provinco Mantova por pridiskuto. En sia kunsido la 13-an de marto, la provinca konsilio de Mantova aprobis, per 15 voĉoj el 20, mocion de prof. Giuliano Longfils, kiu subtenas la tezojn de la Manifesto kaj “petas la naciajn registarojn kaj Eŭropan Parlamenton favori la disvolvigon de Esperanto per konkretaj agoj kaj iniciatoj”. La konsilio sendigis kopion de la decido al UEA “por

diskonigo ĉe naciaj kaj internaciaj organizoj”. (Mantova E-Grupo)

Organizinte du ekspoziciojn, pri la vivo de Tibor Sekeli resp. pri esperantaĵoj aperintaj en 1996, la E-societo en Senta (Jugoslavio) kolektis post sia jarkunveno 135 subskribojn por la Manifesto. Pri la aranĝoj de la societo informis hungarlingve Radio Subotica, kaj la tutan programon subtenis la loka kablotelevido. (R. Petrović)

La Esperanto-Redakcio de Pola Radio dediĉas multe da atento al Kampanjo 2000. La ĉi-koncernaj opinioj de la aŭskultantoj estas utiligitaj i.a. en la semajnfinaj leterkestoj kaj poste sendataj al la Centra Oficejo. Opinioj el gazetoj estas citataj en la ĉiusemajnaj trarigardoj de la E-gazetaro. Per tio Pola Radio volas kontribui al la vigligo de la movada diskutado kaj al la ellaboro de konkretaj projektoj sur loka, landa kaj internacia niveloj; ĝi esperas ke ĉiuj E-amaskomunikiloj priatentos la projekton. (A. Pettyn)

Instituto Sábz Āndišān (Irano) zorgis pri perslingva traduko de la Manifesto, eldonis ĝin en 5000 ekzempleroj kaj disdonis aron da ĝi dum la 10-a Internacia Libroekspozicio en Teherano (26 apr.-6 majo). La publika atento al la Manifesto estis tute neatendita: la instituton bombardis telefonvokoj kaj faksmesaĝoj de universitatoj kaj kulturcentroj. La universitato de Teherano petis informilojn por sia studentaro. (M. Reza Torabi, IREJO)

Zagrebo kandidatas por la UK en 2000

Antaŭ ol entrepreni samcelan vojaĝon al Israelo en junio, ĝenerala direktoro Osmo Buller gastis en Zagrebo de la 15-a ĝis la 18-a de aprilo por konatiĝi kun ties kongresaj ebloj.

Universala Kongreso gastis lastfoje en Zagrebo en la fora 1953. Iom malpli ol duonjarcenton poste Zagrebo denove proponas sin por UK.

La ebla gastigo de monda kongreso forte interesis la instancojn ŝtatajn kaj urbajn kaj ĵurnalistojn: tri elsendoj televidaj pritraktis la viziton de Buller. Li gastis en "Bonan matenon, Kroatio" la 16-an de aprilo, kun aktorino Vida Jerman kaj Spomenka Štimec. (La redakcio de tiu elsendo poste sendis teamon por filmi en maja E-aranĝo, en la vilaĝo bieno de Štimec.)

Buller estis akceptita de la prezidanto de la kroatia parlamento, akademiano kaj poeto Vlatko Pavletić, kiu interesiĝis pri la laboro de nia Akademio, la terminologia evoluo de Esperanto, la financado de la movado kaj ties kunlaboro kun UN kaj Unesko. Ĉi tiu renkontiĝo estis inter la ĉefaj novaĵoj de la televida ĵurnalo, elsendita ankaŭ internacie per satelito.

En la delegacio ĉeestis akademiano Dalibor Brozović, prezidanto de la invitanta landa asocio, Kroatia E-Ligo, ties sekretario Spomenka Štimec, aktorino Vida Jerman kaj deputito-esperantisto Goran Jakovljević.

Ĉe la kulturministerio Buller estis akceptita de vicministro prof. Ivan Šarić kaj ministra helpanto Branka Šulc. Nome de la urbestro, akceptis lin konsilanto Miljenko Cvjetko. Ĉiuj instancoj anoncis sian subtenon okaze de alveno de e-istoj el la tuta mondo.

Por prezenti sian kulturen agadon, Kroatia E-Ligo donis programon en la prestiĝa hotelo Esplanade, kun poezia prezento de Vida Jerman, kiun sekvis operkantisto Neven Mrzlečki, flutistino Petra Đaković kaj la virina

ensemblo Ezerki. Koktelan akcepton donis Turisma Asocio de la urbo.

El gazetara konferenco de Buller rezultis la tri menciitaj elsendoj en televido, sep en radio, kaj artikoloj en kvar vaste legataj ĵurnaloj.

Buller vidis du belajn kontribuojn de Kroatio al la monda E-komunumo, lanĉotajn en la Unua kongreso de la kroataj e-istoj fine de majo: novan Esperanto-poŝtmarkon de 2,5 kunaĵoj kaj specialan moneron de 25 kunaĵoj.

Spomenka Štimec (Kroatio)



De maldekstre: Vlatko Pavletić, prezidanto de la kroatia parlamento, akceptas Vida Jerman, Osmo Buller, Dalibor Brozović kaj Spomenka Štimec.

KAMPANJO 2000

(daŭrigo de p. 101)

La fina rezolucio de la konferenco alvokas Uneskon starigi internacian dokumentan centron pri lingvaj problemoj, internacia lingva komunikado kaj lingvaj rajtoj; kaj la Altan Komisiiton pri Homaj Rajtoj kaj la Centron por Homaj Rajtoj unufoje esplori kaj raportoj pri la stato de lingvaj rajtoj en ĉiuj landoj de la mondo. Kvankam Esperanto ne estas menciita en tiuj rekomendoj, ilia efektivigo atendeble helpus krei la kondiĉojn por konsideri ĝin serioze.

Estontaj paŝoj

UEA-prezidanto Lee kaptis la okazon de la CED-konferenco por aranĝi rendevuon kun d-rino Quisumbing, en kiu ili diskutis pri la partopreno de UEA en la venontjara 50-jariĝo de

la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj. Ĉar UEA mem festos sian 90-jariĝon en aprilo 1998, ekestis la ideo organizi en Ĝenevo komunan simpozion kun la Centro por Homaj Rajtoj, dediĉitan al lingvaj aspektoj de homaj rajtoj. En la venontaj monatoj la du organizaĵoj celos konkretigi tiun ideon.

La organizan laboron en Novjorko plenumis plejparte Lee, Fettes, kaj Rochelle Grossman, la sperta kaj sindona direktorino de la Novjorka Oficejo de UEA. Nepre menciindas ankaŭ la kontribuo de Françoise Cestac, antaŭa asista ĝenerala sekretario de UN kaj multjara CED-kunlaboranto.

Malgraŭ la relativa sukceso de tiu organiza laboro, por povi antaŭenigi la Esperantan idealon samefike kaj

persiste tra multaj jaroj, nepre necesas pli da kunlaborantoj sur la kampo de eksteraj rilatoj — aparte en la agadcentroj de internaciaj organizaĵoj kiel UN, Unesko, Eŭropa Unio kaj Konsilio de Eŭropo. Tial ĉi tiun raporton fermu lasta alvoko, kadre de Kampanjo 2000:

Se vi volas labori por disvastigi la ideojn de la Manifesto de la Esperanto-movado en la vasta neesperantista mondo, kaj se vi posedas diplomatajn kapablojn plus iom da libera tempo, tiam kontaktu unu el la UEA-respondeculoj listigitaj en la koncernaj paĝoj de la Jarlibro. Ni provos trovi konvenajn celon kaj kadron por viaj talentoj.

Mark Fettes

Estrarano pri eksteraj rilatoj

Estrara Raporto: UEA en 1996



La landa asocio de Vjetnamio aliĝis pasintjare al UEA.
Jen gelernantoj de du E-kursoj en Hanojo.

Foto: Nguyen Thi Ngoc Lan

Jen multrilate malkompleta, tamen atentinda resumo pri la okazintaĵoj de Esperantujo en 1996 kiuj ŝajnas gravaj en retrorigardo. Sed ĉar dekduo da paĝoj estas malvasta kadro por tia revuo de eventoj, plejparte temos pri agadoj rekte aŭ malrekte ligitaj al UEA, kaj ankaŭ pri ties administraj detaloj. Konsultante la referencitajn lokojn en la pasinta kaj nuna jarkolektoj de ĉi tiu revuo aŭ en la Jarlibro, vi ricevos pli kompletan bildon pri tiu kaj alia detalo.

Ĝeneralajoj: Stabilaj strukturoj

STRUKTURO KAJ KONSISTO

En Prago la Komitato akceptis la aliĝon de du novaj landaj asocioj, Federacio Esperanto de Bharato kaj Vjetnama Esperanto-Asocio. La statuson de aliĝinta faka asocio ricevis E-Ligo Filatelista / Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj, dum el tiu kategorio elfalis pro malaktiviĝo Universala Artista Ligo de Esperantistoj. Kunlabora kontrakto estis subskribita kun kvar asocioj: Asocio de Esperantistaj Handikapuloj, Esperanto-rondo de Amikaro Bruno Gröning, Spirita Eldona Societo F.V. Lorenz kaj Tutmonda Parolspuro-Asocio. Malaperis Internacia Unuiĝo de la Esperantistoj-

Filologoj, sekve la kunlabora kontrakto kun ĝi nuliĝis. Jarfine UEA havis 58 aliĝintajn landajn asociojn, 9 aliĝintajn kaj 37 kunlaborantajn fakajn asociojn.

Estis 7284 individuaj membroj (IM) en 117 landoj; 47 pli ol en 1995. Ili konsistis el 404 Membroj (M) kun Gvidlibro, 1663 M kun Jarlibro, 550 junaj M kun Jarlibro, 3431 M-Abonantoj, 274 junaj M-Abonantoj, 874 Dumvivaj M (DM), 19 junaj DM, 58 Honoraj M kaj 11 M de Honora Patrona Komitato. Laŭlanda statistiko aperis en aprilo 1997 (p. 66). La enspezitaj kotizoj de la unujaraj kategorioj sumiĝis je 343 169 gld., nur

435 gld. pli ol en la antaŭa jaro. Klarigas tion la neplialtigo de la guldona valoro de la kotizoj kaj, precipe, la fakto ke pro la redukto de membroj pere de Fondaĵo Canuto (vd. "Financo: Spezokonto", p. 107), kiuj ja koncernas la kategorion M-Abonantoj, pligrandiĝis la proporcio de M kun Jarlibro.

La nombro de aligitaj membroj plu malreskis ĝis 13 314 (13 808 en 1995). Tiu multjara tendenco, kiu spegulas la situacion de la orient-eŭropaj asocioj (vd. p. 117), ĉi-foje daŭris pro falo en Bulgario.

Al Societo Zamenhof aliĝis 250 membroj, 20 malpli ol en 1995 (jaro de membrovarba kampanjo), sed konsiderinde pli ol en la antaŭaj jaroj, kiam la nombro pendolis ĉirkaŭ 150. La membroj de tiu subtena kategorio ricevis dum la jaro du cirkulerojn de la prezidanto, unu de la ĝenerala direktoro, akcepton en la UK kaj specialan globkrajonon de la Societo.

La Komitato nomumis kvin novajn

Honorajn Membrojn: Marie Bartovská (Ĉeĥio), Belka Beleva (Bulgario), Zef Luigi Mjeda (Albanio), Eva Seemannová kaj Eli Urbanová (ambaŭ el Ĉeĥio). Forpasis la Honoraj Membroj Ada Fighiera-Sikorska, Manuel de Freitas kaj Norman Williams.

La Delegita Reto de la Jarlibro 1996 konsistis el 1830 individuoj en 88 landoj. Entute estis 42 ĉefdelegitoj, 1018 delegitoj, 132 vicdelegitoj, 68 junularaj delegitoj kaj 1310 fakdelegitoj. (Vd. "Administrado: Servoj", ĉi-sube.)

GVIDORGANOJ

La nomlisto de la Komitato kiu funkcios ĝis la UK en 1998, aperis en la Jarlibro 1997 (p. 15-19). Estis 60 A-, 7 B- kaj 13 C-komitatoj kaj 7 observantoj. La kunsidojn en Prago partoprenis 74 komitatanoj aŭ anstataŭantoj.

La Estraro konsistis el 7 membroj (vd. la kolofonon). En Prago okazis ŝanĝo en la taskodivido: Lipari estis

substituita al Fettes kiel ĝenerala sekretario. Lige kun tio Triolle transprenis de Lipari la respondecon pri kulturo. Por kongresoj, antaŭe fako de Lipari, ne estis elektita nova estrarano, tiel ke tiu kampo fariĝis komuna respondeco de la Estraro. Okazis dutaga kunveno en Roterdamo fine de marto kaj tri mallongaj kunsidoj dum la Praga UK. Krom multa uzo de la elektronika poŝto, la komunikadon inter la estraranoj pliefikigis estrara novaĵletero, kiu aperis 5-foje.

Listo de komisionoj kaj komisiitoj aperis en la Jarlibro 1996 (p. 24-27). En Prago la Komitato alektis al la Komisiono pri Financo B. Venhuizen kaj H. ten Hagen. Krome, por prepari agadplanon por Kampanjo 2000 oni elektis portempan laborgrupon (D. Blanke, R. Corsetti, M. Fettes, LEE Chong-Yeong, M. Lipari, G. Maertens, H. Tonkin, A. Wandel, O. Buller). H. Huppertz demisiis kiel komisiito pri regularoj en julio, ekde kiam tiu ofico vakas.

Administrado: CO glate rotacias

PERSONARO

La 1-an de januaro ŝanĝiĝis la direktoroj. En glata rotacio de taskoj O. Buller transprenis la ĝeneralan direktorecon de S. Milojević, plenuminta la oficon dum 12 jaroj, P. Zapelli fariĝis direktoro de la Centra Oficejo anstataŭ Buller, kaj Milojević ekprizorgis la Libroservon anstataŭ Zapelli.

Pro la foriro en marto de unu el la librotenistoj, la oficistaro reduktiĝis al 11 personoj, el kiuj 2 partatempaj, tiel ke la tuta laborforto egalas al 10 plentempaj oficistoj (10,4 en 1995). Helpe de volontulo la Librotena Fakto povis certigi siajn servojn, eĉ se ofte kun prokrastoj. Sep volontuloj kontribuis — ĉefe al la Libroservo kaj la Kongresa Fakto — dum periodoj de unu semajno ĝis tri monatoj. Al tio aldoniĝis la regula helpo de du nederlandaj esperantistoj por la biblioteko resp. prizorgado de la domo. Krome, du junuloj voluntulis por TEJO dum sume 17 semajnoj.

La CO ricevis entute 17 440 ordinarnajn leterojn, al kiuj aldoniĝis ĉ. 500 ekspresaj kaj registritaj. Se konsideri 3311 retmesaĝojn kaj 3750 telefaksojn, oni ricevis averaĝe 100

skribajn komunikaĵojn labortage. Kvankam bremsita de manko de

laborforto, la aktiveco de la Librotena Fakto restis je la nivelo de 1995: pli ol 24 000 librotenaj operacioj.

EKIPAĴOJ

La Grafika Fakto anstataŭigis sian ĉefan komputilon per pli potenca maŝino por povi pli efike sekvi la evoluon de la programaro (marto, p. 47). La aĉeton kunfinancis TEJO, kiu transprenis la antaŭan komputilon i.a. por uzo de la redaktoro de *Kontakto*. Ankaŭ la redaktoro de *Esperanto* ricevis novan komputilon, kapablan pli rekte komuniki kun tiu de la prespretigisto.

SERVOJ

La Jarlibro aperis komence de julio kaj ampleksis 285 paĝojn. La Delegita Reto travivis fundan revizion surbaze de nova regularo, laŭ kiu delegitoj devas renovigi sian delegitecon ĉiun trian jaron. Kvankam la tuta operacio okazis en limigita tempo, la rezulto estis



La CO-anaro en 1996.

De maldekstre:

István Ertl, Pasquale Zapelli, Marvin Stanley, Osmo Buller, Roy McCoy, Francisco Veuthey, Atie van Zeist kaj Nikola Rašić. Mankas sur la foto Ina v.d. Krans, Simo Milojević kaj Rob Moerbeek.

Financo: Fruktoj de celkonscia mastrumado

(Respondeca estrarano: de Geus.)

SPEZOKONTO

Ankaŭ en 1996 realiĝis la plano pri laŭgrada reduktado de la negativa saldo de la spezokonto. En 1991 la kostoj superis la rimedojn je 88 009 gld., sed pasintjare la breĉo estis 23 299 gld. (t.e. 6 420 gld. malpli ol en 1995). La efektiva evoluo estis eĉ pli bona ol la librotena rezulto montras. Nome, 47 000 gld. el la kotizprocentaĵo de la Praga UK estis rezervitaj por uzo en jaro kiam tiu enspezo pro malgranda UK estos grave sub la averaĝo, do plejparte certe jam en 1997. Sen tiu rezervito la spezokonto havis konsiderindan pozitivan saldon.

La bona evoluo rezultis ankaŭ el ekonomia mastrumado de kostoj fare de la Centra Oficejo, kiu aktive serĉis malpli kostajn liverantojn de servoj kaj materialoj kaj konkurencigis ilin inter si. Preskaŭ ĉiu kostorubriko fini-

ĝis per malpli granda saldo ol buĝetite, sen ke la agado estus reduktita. Reduktiĝis tamen la oficistaro. En tiu rubriko la prezo de la ŝparo estis plia laborpremo en la CO, precipe en la Librotena Fakoj.

La enspezoj pro kotizoj kaj abonoj restis sub la buĝeta celo, ĉar oni membris je 200 esperantistoj malpli per Fondaĵo Canuto. Tiel oni lasis en la Fondaĵo rezervon por povi plimulti la "kanutigojn" en la finance malfacila jaro 1997. La Libroservo kaj Eldona Fakoj plibonigis sian rezulton kompare kun 1995, kvankam ilia neta gajno restis sub la buĝeto pro stok-amortizoj kiujn la buĝeto ne antaŭvidis.

BILANCO

La fruktoj de celkonscia financa mastrumado de la Asocio videblas ankaŭ en la bilanco. Ĝiajn ciferojn ekstre plibeligis la lastatempa kreska konjunkturo de valorpapiroj, tiel ke necesas rigardi ilin kun konscio pri la fluktuemo de borsokurzoj.

La Asocia Kapitalo (inkluzive Kapitalo Azio sed sen Kapitalo Dumvivaj Membroj) estis 256 963 gld. en 1986, 732 335 en 1991 kaj 936 602 en 1996. Kapitalo DM, kiu en 1986 kaj 1991

estis sur sama nivelo (respektive 431 791 kaj 421 841), atingis 899 482 gld. en 1996. La estonta financado de servoj al Dumvivaj (kaj Honoraj) Membroj estas do radikale pli sekura ol antaŭ 10 jaroj, kiam la nombro de tiuj membroj estis 985 (en 1996: 951).

Malpli spektakle sed stabile kreskis la totalo de fondaĵoj: 342 430 gld. en 1986, 500 794 en 1991 kaj 574 639 en 1996. Kelkaj fondaĵoj ankoraŭ malproksimas de sia dezirinda grandeco, je kiu ili produktus rentumon sufiĉan por la bezonoj de la kuranta jaro. Donacoj estas tre bonvenaj precipe al la fondaĵoj Ameriko kaj Volontula, kies kapitaloj (nun respektive 37 538 kaj 69 014 gld.) fakte devus triobliĝi.

INSTITUCIO HODLER '68

La Instituto, kies celo estas finance subteni ĉefe UEA, asignis subvenciojn al Fondaĵo Canuto, Fondaĵo Ameriko, Nitobe-Simpozio, Akademio Internacia de la Sciencoj, E-redakcio de Pola Radio, Bona Espero kaj la Oficejo de TEJO en Bonn; sume 14 000 gld. Ĝi posedas domon en Antverpeno, en kiu funkcias Flandra E-Ligo kaj la E-klubo "Verda Stelo", kun favoraj kondiĉoj.

kontentiga. La Jarlibro registris 1830 delegitojn, 85% de la antaŭa jaro. Estas notinde ke la paĝnombro de la Jarlibro apenaŭ reduktiĝis pro la plimultiĝo de faknumeroj kaj retpoŝtaj adresoj. (Detala analizo de la reformo aperis en okt., p. 161.)

La malnetaj enspezoj de la Libroservo sumis je 276 796 gld., 21 320 gld. (8,3%) pli ol en 1995. La neta gajno superis la antaŭan jaron per 2424 gld. (2,73%). Ankaŭ la vendoj de la Eldona Fakoj kreskis (nete +5211 gld.). Ambaŭ kreskoj rezultis el sukcesaj oferto-kampanjoj al elektitaj celgrupoj kaj el la nekutime sukcesa kongresa libroservo. Entute la Libroservo plenumis 1712 mendojn de 766 klientoj el 62 landoj, vendante 11 914 librojn k.a. varojn, aldone al la 5582 venditaj dum la UK. La abonservo peris 403 gazetabonojn al 180 individuoj, kun neta gajno de 4733 gld. (6083 en 1995).

Aperis la 6-a eldono de la internacia lernolibro *Saluton!* de A. Childs-Mee, senŝanĝa represo de la gvidlibreto *Internaciaj Ekzamenoj de UEA/ILEI*, kaj franclingva E-dokumento (vd. "Lingvo...", p. 114). Publikiĝis 2-a eldono de *Vortaro Esperanto-Suahila*, reviziita kaj multe pliampleksigita de la aŭtoro, prof. J. Knappert. La eldonon de la vortaro subvenciis Fondaĵo Saliko.

Kongresoj: Kompleta mobilizo

(Respondeca estrarano: Lipari ĝis la UK, poste la Estraro kiel tuto.)

La 81-a Universala Kongreso okazis en Prago (Ĉeĥio) de la 20-a ĝis la 27-a de julio, kun 2972 aliĝintoj el 66 landoj. La Alta Protektanto de la Kongreso estis la ŝtatprezidanto Václav Havel, tutmonde fama verkisto.

Krom la Alta Protektanto la Kongreson aparte salutis Boutros Boutros-Ghali, Ĝenerala Sekretario de UN; Federico Mayor, Ĝenerala Direktoro de Unesko, la esperantista kardinalo Miloslav Vlk kaj pluraj aliaj eminentuloj.

La Kongresa Temo "Kulturo: valoro aŭ varo?" ricevis plurajn laŭdojn pro la taŭga kaj populara traktado, sed ĝi tamen restis en la ombro de la pli alloga kaj modele altnivela Nitobe-Simpozio (vd. "Eksteraj rilatoj kaj informado", p. 108).

Pli internan karakteron havis alia

pioniraĵo, seminario de UEA pri lingvopolitiko (vd. "Lingvo...", p. 114).

La scienca programon kronis partopreno de Nobel-premiito el nia medio, prof. Reinhard Selten, en la programo de Internacia Kongresa Universitato.

La artan programon de la Praga UK oni povas konsideri kiel eksterordinaran. La Kongreso omaĝis al la centa datreveno de la surscenigo de la unua E-lingva teatraĵo, *Unua brandfaristo*, per riĉa kaj kvalita teatra programo. Krom la konata Bulgara E-Teatro, festludis alia granda (10-persona) trupo kun signifa, preskaŭ 40-jara, tradicio: la drama grupo de Studenta Esperanto-Klubo (Zagrebo). La muzikan programon ornamis la kongreslandanoj mem: ne malpli ol 14 profesiaj muzikistoj troviĝis inter la

ĉeĥaj kongresanoj. La kultura programo brilis krome pro la partopreno de la aktorinoj Georgina Almanza, Jadwiga Gibczyńska kaj Eva Seemannová, kaj de Flávio Fonseca kun liaj muzikistoj. Ankaŭ la magiisto Trixini trovis sian lokon en la programo.

Oni memoros Pragon ankaŭ kiel la naskiĝlokon de la Manifesto de la Esperanto-movado pri niaj bazaj ideoj kaj fundamentaj celoj. Subskribis ĝin pli ol 700 kongresanoj, kaj poste dum la jaro pli ol 4000 personoj el la tuta mondo. La Manifesto nun ekzistas en dekoj da lingvoj.

La ĉeĥa movado komplete mobilizis sin por la Kongreso, kio videbliĝis en granda kvanto da afablaj kaj lertaj helpantoj. Ankaŭ en tiu senco la

Kongreso tenas senduban rekordon.

Glate kaj konvene funkciis la kongresaj servoj: loĝigo, ekskursoj, bankedo. Sekve malmultis la plendoj pri tiuj servoj.

La UK-on akompanis same bone organizita Infana Kongreseto — kiu ja montris ke ĝi postulas kaj meritas pli da atento — kaj pluraj aliaj eventoj apudaj. La bona financa rezulto de la Kongreso refreŝigis la Propagandan Konton de UEA per mono necesa por la antaŭenigo de Esperanto, sed ankaŭ donis stabilan bazon al la landa asocio por plua evoluo. La diligentaj kaj ŝparemaj ĉeĥaj esperantistoj certe scios kiel uzi ĝin. Ni ĉiuj ŝuldas al ili dankon por bona kaj memorinda Kongreso.

Revuoj: De Zamenhof ĝis Zaratuŝtro

ESPERANTO

La plej legata movada revuo ne sukcesis en 1996 gardi senŝanĝe grandan legataron: kvankam la “abonoj el propra poŝto” ne malkreskis, mankis ducento da legantoj kutime membrigataj el Fondaĵo Canuto (vd. “Financo: Spezokonto”, p. 107). Tial *Esperanto* povis en 1996 nombri 4932 abonantojn, post 5121 en 1995.

La redaktistoj ofte prokrastigis kelkajn tagojn, sed la averaĝa forsendotempo de la revuo el la CO restis la komenco de la koncerna monato. La anonc-enspezoj, 10 455 gld., superis la rezulton de 1995 (9584 gld.), sed restis sub la buĝetitaj 12 000 gld.

Grandaj artikoloj aperis i.a. pri la kongreslando Ĉeĥio (jan.), lingvopolitiko (jan., majo), Esperanta teatro (feb., dec.), problemoj de instruado (feb.), la vizitoj de prezidanto Lee en Litovio (maj.) kaj Ĉinio (nov.), la evoluoj ĉirkaŭ Fondumo Zamenhof en Bjalistoko (majo, dec.), strategiaj demandoj de la E-komunumo (jul.), Zamenhof (jun., okt.), E-bibliotekoj (nov.). Estis intervjuoj i.a. Emma Bonino, ano de la Eŭropa Komisiono (marto), László Polgár, patro de tri e-istaj ŝakĉampioninoj (apr.) kaj Ralf Gion Fröhlich (majo; vd. “Junularo”, p. 112). Per diskut-artikolo (“For la Es-

perantan sektismon!”, jul.-aŭg., p. 136) Ziko M. Sikosek vekis grandan debaton, kies eĥoj aŭdiĝis ankoraŭ en 1997.

La recenza rubriko pritraktis 38 librojn kaj aliajn eldonaĵojn, sur 18 paĝoj. “Lasteaperis” premiere prezentis 261 novaĵojn. La Akademia rubriko aperis 6-foje (vd. “Lingvo...”, p. 114), kaj 12 paĝoj estis dediĉitaj al la bul-teno *Influo* (vd. “Informado”, p. 109).

KONTAKTO

Kontakto altiris rekordan distribuon: 2009 pagintaj ricevantoj anstataŭ 1830 en 1995. La nombro konsistis el 843 junaj individuaj membroj, 119 Patronoj aŭ Dumvivaj Patronoj de TEJO, kaj 441 simplaj kaj 606 kolektivaj abonoj.

Aperis 6 numeroj, kies ĉefartikoloj traktis temojn tiel variajn kiel la romia imperiestro Justiniano, origino de la universo, ŝamanismo, olimpiaj ludoj, Zaratuŝtro kaj la situacio de aŭstraliaj indiĝenoj. En

ĉiu numero aperis almenaŭ unu artikolo ĉerpita el Unesko-eldonaĵoj kaj tekstoj en facila lingvaĵo por E-lernantoj. Tre popularaj estis la konkursoj, ĉiam kun libropremioj donacitaj de TEJO. Per zorga enpaĝigo kaj abunda uzo de bildoj *Kontakto* plu estis grafike avana en la E-gazetaro.



Eksteraj rilatoj ka

(Respondecaj estraranoj: Lee, Fettes, pri el



La pasinta jaro estis certe la plej aktiva kaj promesplena sur la kampo de eksteraj rilatoj de la lasta jardeko. Pli granda estrara engaĝiĝo sur tiu tereno trovis efikan subtenon en la CO kaj entuziasman kunlaboron de volontuloj multloke.

Atuto de la jaro estis la Nitobe-Simpozio de Internaciaj Organizaĵoj (okt., p. 162), ligita al la 81-a UK kaj grandparte subvenciita de la neesperantista Japana Fondaĵo, arango kiu instigis pli ol dek ekstermovadajn fakulojn pri lingvaj rajtoj, lingvoinstruado kaj internacia lingva komunikado al senpera esplorado pri Esperanto kaj repripensado de diversaj lingvopolitikaj ŝablonoj. Ĉefa atingo de la Simpozio estis la malfermo de novaj pordoj al kunlaboro, interalie kun Unesko kaj la Eŭropa Buroo por Malpli Uzataj Lingvoj.

La pozitiva rilato kun Unesko estis des pli grava ĉar meze de la jaro anonciĝis ŝoka rekomendo de ties fako pri neregistaraj organizaĵoj (NRO-j) reklasi UEA en novan kategorion de “laŭkazaj” kunlaboraj rilatoj (jul.-aŭg., p. 121). Bone kunordigitaj intervenoj de pluraj estraranoj, Honoraj Patronoj kaj lokaj reprezentantoj rapide certigis la frostigon de tiu decido, kaj UEA daŭre restis sur la nivelo de “konsultaj rilatoj”.

Plivigliĝis kontaktoj ankaŭ kun aliaj branĉoj de la UN-sistemo. Aldone al la konstanta reprezentado en Novjorko (gvidas Rochelle Grossman), Parizo (Unesko, gvidas Barbara Des-

j informado: Promesplenaj novaj dimensioj

(eksteraj rilatoj; Jegorovas, pri informado.)



piney), Ĝenevo (UNICEF, Christine Sixtus-Pot) kaj Vieno (gvidas Hans-Michael Maitzen), Lee kaj Fettes vizitis la Novjorkan sidejon de UN en januaro (marto, p. 41), kaj Fettes estis tie denove en novembro por pretigi seminarion kaj konferencon por la posta jaro. UEA-delegitaro partoprenis la novembran Mondan Pinto-Konferencon pri Nutraĵoj en Romo kaj la akompanan Forumon de NRO-j (dec., p. 213). Menciindas krome la aktiva partopreno de TEJO en la Monda Junulara Forumo de UN (vd. "Junularo", p. 112).

En Eŭropo, UEA daŭre subtenis la agadon de la Laborgrupo pri la lingva problemo en Eŭropa Unio, gvidata de Hans Erasmus, kiu ankaŭ rolas kiel komisiito ĉe la pli multlanda, sed malpli potenca Konsilio de Eŭropo. Erasmus zorgis ankaŭ pri UEA-partopreno en ekspozicio de NRO-j (nov., p. 185), dum septembra sesio de Eŭropa Parlamento (EP). En la dua duono de la jaro komenciĝis preparo por nova seminario ĉe EP, en kiu kunulos kelkaj el la Nitobe-invitoj.

La nova prezidanto de UEA alportis novan dimension en ties eksterajn rilatojn per siaj rendevuoj kun registaraj gvidantoj en kelkaj landoj, inkluzive de Litovio (maj., p. 82) kaj Ĉinio (okt., p. 164). Tiuj vizitoj estis ĉiam aranĝitaj kunlabore kun la landa asocio, kaj celis plifortigi la pozicion de Esperanto en la landa politiko.

Sur la krucpunkto de eksteraj rilatoj kaj faka agado, Wandel (estrarano pri

la lasta) plu flegis la kontaktojn ligitajn kun pluraj NRO-j dum Pariza vizito ankoraŭ en 1995 (dec. '95, p. 207). Li korespondis pri kunlaboro kun Internacia Asocio de Universitatoj (IAU) kaj Internacia Asocio de Universitataj Profesoroj kaj Lekciistoj (IAU-PL), kaj iniciatis kontaktojn inter tiuj du NRO-j kaj Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS). Sekve AIS petis membriĝi en tiuj NRO-j: sukceso de ĝia aliĝpeto al IAU estus grava atingo ne nur por AIS sed por la tuta Esperanto-komunumo, kiel rekono de la scienca kaj akademia potencialo de Esperanto fare de internacia tegmenta organizo de universitatoj. Wandel kontaktis ankaŭ kun Monda Federacio de Sciencaj Laboristoj (MFSL), kiu invitis UEA partopreni en sia simpozio ĉe Unesco pri "Scienco, etiko kaj socio", kie UEA estis reprezentita de Triolle kaj de François Lo Jacomo (nov., p. 184).

INFORMA FAKO


Por informado, la elstara momento de la jaro en dekoj da landoj denove estis la Ago-Tago, la 5-an de oktobro (dec., p. 201; jan. '97, p. 4). Alian specon de informa forumo konstituis lingvaj ekspozicioj kaj, plej moderne, la multĝantaj informpaĝoj de landaj kaj aliaj asocioj en la Tut-Tera Teksaĵo (pri ambaŭ vd. "Landa agado: Eŭropo", p. 111). Francoj kaj grekoj havis por imponi atutajn libregojn en la mano: la Zamenhof-biografion *L'homme qui a défié Babel* de R.



Centassi kaj H. Masson, resp. la kolosan monografion *Esperanto i glóssa tis elpídas* de K.G. Kiriakos, pri ĉiuj aspektoj de E-o, prezentitan en publika solenaĵo (jan. '97, p. 17).

La eĥo de la Praga UK estis precize mezurita de la komisiono pri informado de Ĉeĥa E-Asocio, kiu kolektis 137 gazet-eltondaĵojn rilatajn al la kongreso.

La neregula bulteno pri informado, *Influo*, fariĝis konstanta rubrikego en ĉi tiu revuo, sur po 4 paĝoj en marto, julio kaj novembro. Gastredaktoro Geoffrey Greatrex varbis, krom multaj etaj informoj pri gazet-artikoloj, ekspozicioj kaj aliaj atestaĵoj de la tutmonda informada laboro, eĥo-vekajn artikolojn, kiel ekz. la propono de Ian Fantom (jul.-aŭg., p. 131) pri komuna bulteno de ĉiuj landaj asocioj de UEA.



Landa kaj regiona agado: Ĝemela helpo interlande

AFRIKO

(Respondeca estrarano: Triolle.
Komisiito: H. Bakker.)

Ankaŭ esperantistoj suferis pro milito en centra Afriko. Ni ne scias la nomojn de la mortintoj, nur de tiuj kiuj forkuris kaj anoncis sin vivantaj en rifuĝejoj. Apenaŭ ricevante helpon ili malsatas, dormas sur nuda tero, ne havas vestaĵojn, suferas malsanojn. Ili sukcesas foje sendi leteron, petante krom mona helpo ankaŭ esperantaĵojn: eĉ en granda mizero homo bezonas krom materia ankaŭ spiritan nutraĵon. Multaj samideanoj en riĉaj landoj klopodis helpi ilin. En Afriko

vokas por korespondantoj kaj "ĝemelantoj" en aliaj landoj. Naskiĝis Zimbabva E-Instituto, kies gvidanto traveturadis sian kaj ĉirkaŭajn landojn helpe de Eduka Fondaĵo Carson (jul-aŭg., p. 125). En la plej multaj aliaj landoj la agado plu restis sur modesta nivelo. Granda potencialo ekzistas en Niĝerio; H. Farukuoye flegas ĝin kun neelĉerpeblaj energio kaj sindediĉo.

UEA reeldonis *Vortaro Esperanto-Suabila* (vd. "Administrado: Servoj", p. 107). D-rino K.M. Hall plu redaktis la bultenon *La Afrika Reto*, de kiu aperis jam 15 numeroj. Ĝi estas modesta sed efika podio por afrikaj verkantoj de poemoj, rakontoj, eseoj ktp.

AMERIKO

(Respondeca estrarano: Triolle.
Komisiito: A. Orellana Rojas.
8-membra komisiono.)


La ĉefa rezulto de la jaro estis la Tria Amerika Kongreso en februaro en San José (Kostariko), kun partoprenantoj el 17 landoj (apr., p. 61). Unu el la sekvoj de la kongreso estis la lanĉo de TTT-hejmpaĝo pri la amerika agado, sub la respondeco de J. Rezende Piton. Nacilingvan hejmpaĝon instalas poste ankaŭ la E-asocioj de Brazilo, Kostariko kaj Meksiko.

Fondiĝis Panama E-Asocio kaj re-fondiĝis Kostarika E-Asocio. Reaktiviĝis Brazilia E-ista Junulara Organizo, kiu ekprizorgis rebatoservon por kolekti gazetarajn (mis)menciojn pri Esperanto kaj laŭbezzone reagi al ili (marto '97, p. 47). Brazilia E-Ligo agis modele ankaŭ en 1996, kion indikis eldono de profesie farita informilo pri Esperanto, regula aperigo de la organo *Brazilia Esperantisto*, elstara landa kongreso en julio kaj seminario pri informado en novembro.

La komisiono faris bazan planon pri agado ĝis la jaro 2000. Ĉiu landa asocio kaj aktivulo ricevis ĝian kopion. En la UK la komisiono okazigis publikan kunsidon kaj vendadon de varoj ĉe informbudo favore al Fondaĵo Ameriko. Tiu fondaĵo de UEA ebligis en 1996 al grupoj kaj izolitaj esperantistoj en Argentino, Bolivio, Meksiko, Nikaragvo, Panamo, Paragvajo kaj Peruo ricevi lernilojn kaj legolibrojn. Multaj el ĉi tiuj estis donacitaj de Internacia Esperanto-Instituto, Norvega E-Ligo kaj S. Ledon, kontraŭ sendokostoj. La fondaĵo subvenciis ankaŭ la vojaĝon de kvin partoprenantoj de la Tria Amerika Kongreso.

Ekĝermas ĝemeliĝo de kluboj kaj asocioj inter Kostariko kaj Israelo, Brazilo kaj Kanado, Usono kaj Bolivio, Brazilo kaj Skotlando. Promesplena estas la interesiĝo en Usono pri la laboro de la komisiono, dank' al speciala rezolucio de la landa kongreso en julio.

Instruvojaĝojn faris Bill Maxey (Usono) tra Kostariko, Nikaragvo kaj Panamo; Katarina Bodnárová (Slovakio) tra Brazilo; Atilio Orellana Rojas tra sia propra lando Argentino, tra Bolivio, Ĉilio, Ekvadoro, Kostariko, Nikaragvo, Panamo kaj Peruo.



Etoso dum asocia jarkunveno en (eks-)Zairio: de maldekstre, Emile Malanda, pioniro Nduantoni Ngangu kaj lia filo.

Esperanto fariĝis ilo de interhoma helpo kaj solidareco.

Komence de la jaro okazis la Kvara Afrika Kongreso en Moshi (Tanzanio), kiu kunvenigis 30 tanzanianojn kaj 8 eksterlandanojn (feb., p. 21). Samtempe disvolviĝis la tria Togolanda E-Kongreso (TEK) kun 137 partoprenantoj (apr., p. 65). Jarfine la kvara TEK (apr. '97, p. 64) havis 70 partoprenantojn: malpli multaj pro malpli da monrimedoj. Unuiĝo Togolanda por Esperanto restas modelo por aliaj organizaĵoj en kaj ekster Afriko, kvankam ankaŭ ĝi spertas problemojn, i.a. malvigligon de iuj kluboj.

Madagaskaranoj organizis la Unuan Interinsulan E-istan Kongreson en aŭgusto (apr. '97, p. 65), kun po unu alilanda partoprenanto el Francio, Svedio kaj Reunio. La madagaskara movado multe kreskis en 1996; ĝi nun

Aliaj bultenoj estas redaktataj en Madagaskaro (*Inter Ni*) kaj Togolando (*Alvoko, Ondo da Vero*), kaj produktataj en Nederlando.

La 82-a UK en Prago gastigis dekon da afrikanoj (vd. intervjuon kun unu el ili en okt., p. 171). Tiel grandan nombron ebligis ke la koncernaj ĉefaj ambasadoj agis malpli malhelpeme ol tiuj de aliaj lastatempaj kongreslandoj. Multaj afrikanoj partoprenis poste ankaŭ en la ILEI-konferenco aŭ IJK.

La Estraro agnoskas ke la kontinueco de la afrika agado ankoraŭ tro dependas de malmultaj unuopuloj kaj tial restas minacata. Necesas plimulti la ligojn inter Afriko kaj alikontinentaj asocioj, kluboj kaj unuopuloj.

La tutan agadon finance ebligis la donacoj de membroj de UEA al la Fondaĵo Afriko, kiu restas la bazo por la agado jam 17 jarojn.



AZIO

(Respondeca estrarano: Jegorovas. 7-membra komisiono.)

Du eventoj en 1996 markis la organizon plifortigon de la movado en Azio: akcepto de Federacio Esperanto de Bharato kaj de Vjetnama E-Asocio kiel landaj asocioj de UEA, kaj la aŭgusta okazigo de la Unua Azia E-Kongreso en Ŝanhajo (nov., p. 181).

La Azia Kongreso arigis 584 partoprenantojn el 18 landoj, kiuj en pluraj kunsidoj traktis la temon "Azio kaj la 21-a jarcento". Okazis multaj fakunsidoj. Ĉar temis pri la unua fojo, ne eblis eviti organizajn mankojn, el kiuj la Komisiono pri Azia E-Movado (KAEM) esperas tiri ĝustajn instruojn por la dua kongreso, okazonta en Vjetnamio en 1999. Ĝenerale la kongreso nepre estis pozitiva sperto, kaj la ĉinaj movadanoj meritas grandan laŭdon por la kuraĝo akcepti la pioniran taskon.

Dum la Azia Kongreso evidentiĝis la bezono pli multe emfazi en la es-tonta agado de KAEM la plialtigon de la lingva nivelo de aziaj esperantistoj. Ĝi estas multe pli grava tasko ol la kvanta kreskigo de la movado, kaj tiurilate multo estas lernebla el la sperto de la afrika agado de UEA. Jam de longe UEA provizas lernantojn en pluraj aziaj landoj per materialoj, financataj el Fondaĵo Azio, sed tiu agado devus eĉ pli kreski. Tiucele la Fondaĵo en 1996 unuafoje pagis kolektivajn abonojn de *Kontakto* al E-grupoj en Ĉinio, Irano, Nepalo, Pakistano kaj Vjetnamio. La suma nombro, 135 ekzempleroj, tamen ne sufiĉis

por kontentigi la efektivan bezonon.

KAEM eldonis 3 numerojn de sia bulteno *Esperanto en Azio*, kompetente redaktata de ges-roj Doi en Japanio. Ĝenerale la japana movado, kiu organizas la plej forta en Azio kaj ankaŭ finance disponas pri la plej bonaj ŝancoj, prenis la evoluigon de la azia movado kiel sian honoran taskon. La donacoj al Fondaĵo Azio venas preskaŭ ekskluzive el Japanio.

En Irano estis oficiale registrita la instituto Sábz Ándiŝan, kiun fondis ĉefe aktivuloj de la tiea landa sekcio de TEJO. Ĝia statuta celo estas esplorado kaj aplikado de Esperanto. La irana movado emas daŭre kreski, kio ne mirigas, se konsideri ekz. la oftan aperon de artikoloj pri Esperanto en gravaj gazetoj. Certagrade la kreskon tamen bremsas manko de interna harmonio en la irana movado.

EŬROPO

(Respondecaj estraranoj: Triolle por Okcidenta kaj Jegorovas por Orienta Eŭropo.)

Ne ekzistas speciale eŭropa landa agado de UEA, sed agadoj de landaj asocioj (LA) de UEA. Kiel malpozitivaj notindas ekz. la plimultiĝo de individuaj agadoj sen kohera tutlanda plano — kaj tial sen optimuma efikeco — kaj ankaŭ tio ke ne ĉiuj estraranoj de la LA-j estas individuaj membroj de UEA, sekve ili ne troviĝas en la rekta informfluo.

Elstaris tamen multaj pozitivaj. Ĝenerale la bildo de Esperanto estis favora, kio ŝuldiĝis al la konstanta agado de LA-j (ekz. Finnlando, Francio). Moderniĝis la komunikado, ekz. en Hispanio, kies LA investis en respondilo, faksilo kaj Interreto. La plej modela utiliganto de tiu lasta sendube estis la sveda LA. Moderniĝis ankaŭ la inform-materialoj (ekz. Nederlando), multiĝis intervjuoj en radio, televido kaj tutlanda gazetaro (ekz. Finnlando, Francio, Irlando), kaj informado kadre de lingvaj ekspozicioj (Francio, Italio, Portugalio) same kiel en eŭropaj kunvenoj (ekz. en la belga Bieuvre okaze de kunveno de eŭropaj kamparanoj), instru-seminarioj, inaŭguroj de stratoj (ekz. en Vicenza, Italio).

Daŭris la vojaĝigo de eminentaj e-istoj, kiuj pliriĝas la lokan agadon kaj reklamas la uzon de la internacia lingvo (prelegvojaĝoj en Danio, Francio, Norvegio, kaj kontribuo de prof. Selten al scienca programo en Hispa-

nio). Multis la plurlandaj renkontiĝoj, ĉu tradiciaj kiel la trilandaj inter Germanio, Belgio kaj Nederlando, ĉu sporadaj kiel la francaj-italaj kaj Hansaj tagoj. Enplektiĝas en la helpo al ne-eŭropaj e-istoj pluraj LA-j: brita, franca, germana, norvega, portugala, sveda kaj dana, kiu havas novan "transkontinentan solidarprojekton". Kataluna E-Asocio muntis "projekton de kunlaboro por la rekonstruo de la asocia reto de Bosnio kaj Hercegovino" (apr., p. 67).

En la eksaj socialismaj landoj la ĉefa evento kompreneble estis la 81-a UK en Prago (vd. "Kongresoj", p. 107). Rimarkinda estis ankaŭ la vizito de la prezidanto de UEA al Litovio. Apud aliaj eminentuloj de la lando lin akceptis prezidento Brazauskas, kiu konsentis fariĝi "amiko de Esperanto", nova honora funkcio, por kiu la Estraro klopodas trovi utilan celon. Kroatia E-Ligo ankaŭ en 1996 donis modelon al aliaj pri ofta utiligo de amaskomunikiloj. Iom ĝenis tie la pluekzisto de alia organizo, pretendanta tutlandecon. Certa organiza malklareco restis en Rumanio, kie la nova LA de UEA, Rumana E-Asocio, ankoraŭ ne plene akceptiĝis kiel movada tegmento. Tre malbona estas la situacio de Albana E-Ligo, kiu ne scias serioze establiĝi kiel organizaĵo. En Pollando plurloke disvolviĝas tre vigla agado, sed pro la konfuzo kaj senkonsileco de la gvidantaro de Pola E-Asocio nenia kunordigo ekzistas por rekonkeri al la lando ĝian tradicie gravan rolon en la monda movado. Senkonsileco, plifortigita de la ekonomia marasmo en la lando, paralizis la agadon ankaŭ en Bulgario. Promesdona estis la evoluo en Slovakio, kie progresis, i.a. per kunsido de slovakoj en la Praga UK, preparoj por ree fondi LA-n en 1997.

OCEANIO

La preparado de la UK 1997 plene markis la movadan vivon en Aŭstralio kaj ankaŭ en Nov-Zelando, kie okazos postkongreso. Por la dua fojo iliaj LA-j aranĝis komunan kongreson, ĉi-foje en Aŭklando (Nov-Zelando), kun 45 partoprenantoj (apr., p. 65). En la sama monato, januaro, funkciis en Adelajdo la 12-a Aŭstralia E-Somerlernejo, kun 59 kursanoj. Jam de 1995 daŭras en tri lernejoj de la aŭstralia ŝtato Viktorio, zorge de A. kaj J. Bishop, la propedeŭtika instruprojekto EKPAROLI (majo, p. 92).

Junularo: Kun sufiĉa fido antaŭen

(Respondeca estrarano: Lipari. Por pliaj detaloj vidu la jarraporton de TEJO, *TEJO tutmonde* 3/1997.)

Kiel en la pasintaj jaroj, TEJO travivis bonan jaron de aktiveco en 1996. Ĉi-foje ankaŭ la financa flanko kunlaboris por igi la jaron sukcesa.

En 1995 la tiam fondita Eŭropa oficejo de TEJO (BonEJO) kaŭzis signifan deficiton pro ne-ricevo de kelkaj atenditaj subvencioj. En 1996 oni sukcesis parte ripari tiun deficiton, ĉar TEJO efektive ricevis ne nur la administran subvencion de Eŭropa Junulara Fondaĵo, maltrafitan en 1995, sed ankaŭ, por la unua fojo, subvencion de la EU-komisiono por kovri la kostojn de BonEJO. Krome, BonEJO sukcesis akiri pliajn sumojn, pli etajn. Kune kun ŝparemo de la estraro tio kaŭzis ke la Fondaĵo Junularo havis en 1996 pozitivan saldon de ĉ. 20 000 gld. Tio ne sufiĉas por rehavi la firman financon bazon de antaŭ 1995, sed montras ke TEJO reiris sur la ĝustan vojon.

Plej okulfrapas, denove, la laboro de Komisiono pri Eksteraj Rilatoj (KER). Jen kelkaj punktoj, pri kiuj troveblis pliaj detaloj en *TEJO tutmonde* kaj en ĉi tiu revuo:

— Kelkaj el la plej aktivaj KER-anoj atingis tre altan nivelon en la “krokodilaj” eŭropaj strukturoj, kio tre helpas al TEJO kompreni kaj utiligi ilin. Ralf Gion Fröhlich elektigis en marto prezidanto de Eŭropa Kunordiga Buroo de Internaciaj Junularaj Organizoj (majo, p. 84). Tiu buroo sub la gvidado de TEJO kunfandiĝis, kun i.a. Junulara Forumo de Eŭropa Unio, al Eŭropa Junulara Forumo. En

tiu nova strukturo Fröhlich elektigis al la komisiono pri Konsilio de Eŭropo kaj Nóra Csiszár al la komitato pri Virinaj Aferoj. Anna Ritamáki por TEJO ekokupis lokon por la periodo 1996-97 en la Konsila Komitato pri junularaj aferoj de Konsilio de Eŭropo. Krome, TEJO la unuan fojon estas inter la ses organizoj en la Gvida Konsilio de ĉi tiu komitato, kie oni kunlabore kun la registaroj decidas i.a. pri la plej gravaj subvencioj al TEJO (jan. '97, p. 6).

— TEJO kunorganizis kun Junulara Forumo de Eŭropa Unio konferencon pri homaj rajtoj (jan. '97, p. 7).

— KER kunordigis la partoprenon, novembre en Vieno (jan. '97, p. 6), de sep esperantistoj en la Monda Junulara Forumo de UN, kunorganizita de TEJO. Dank' al mal-

Ĉi tiuj gejunuloj kolektiĝis en la 16-a Internacia Renkontiĝo de Popolaj Orkestroj (Toruń, Pollando), kie Esperanto de longe rolas pontlingve.



Instruado: Inventemaj investoj

(Respondeca estrarano: Triolle.)

Por ankaŭ tiel pravigi konstantan kunlaboradon kun Unesko, UEA devus pli inventeme investi en edukado ĝenerale. Temas ja pri kampo pli vasta ol nur Esperanto-instruado, pri kiu respondecas ĉefe ILEI. Bona ekzemplo ja estis en 1996 la venigo de juna zairia Unesko-stipendiulo, Nkunku Niansi, al stud- kaj prelegvojaĝo en Francio, Belgio, Nederlando kaj Germanio. Li prelegis i.a. pri proverboj de sia lando, respegulantaj la popolan saĝon. Tio estis bona okazo por konsciigi la aŭskultantojn ke ne sufiĉas kompreni la lingvon por kompreni la signifon.

Ĝenerale 1996 estis bona jaro por instruado. Korespondaj kursoj estis senpage proponataj en Kimrio; ili startis en Italio kaj estis preparataj en Islando. Sukcesaj ili estis en Pakistano, kun 150 lernantoj (feb. '97, p. 38). Sur la bazo de 10-leciana kurso el Usono, pretiĝis retroŝta kurso de Esperanto en la hispana lingvo. Aperis la lingvo-instrua KD-ROM *Travel Talk*, por parolantoj kaj lernantoj de la angla, nederlanda kaj Esperanto. En oktobro la Pola Televido ekelsendis adaptaĵon de la kurso *Mazi en Gondlando* (dec., p. 203). La universitato de Sieno (Italio) starigis

korespondan E-kurson por lingvoinstruistoj (feb., p. 25). Malfermiĝis kursoj ankaŭ en la universitatoj de Havano (Kubo), Valencio (Hispanio), Bariloĉo (Argentino), Namuro (Belgio) kaj Perto (Aŭstralio), dum malaperis tiu en Aix (Francio), gvidita de Michel Duc Goninaz.

Seminarioj por plialtigi la lingvan aŭ instruon nivelon de E-instruistoj estis organizitaj ekz. en Italio, Danio kaj Norvegio. Fondiĝis E-Esplora Centro en Shijiazhuang (Ĉinio). E-kursoj en Universitato de Tria Aĝo aŭ simila institucio (apr., p. 69) funkciis almenaŭ en Britio (8), Aŭstralio (6), Brazilo (1), Ĉinio (2), Francio (3) kaj Italio (2). Ankaŭ en 1996 bone sukcesis la tradiciaj kursoj en la usonaj San-Francisko kaj Hartford, same kiel en la Popola Altlernejo de Karlskoga (Svedio).

avaraj donacoj de multaj Patronoj de TEJO, ili povis reprezenti TEJO-n kaj siajn landajn organizaĵojn en tiu grava internacia rondo.

— KER organizis du sukcesplenajn seminariojn en 1996: en Irlando, kun ekologia temo (jun., p. 104), kaj komunan kun Skolta Esperanto-Ligo, en Pollando (jan. '97, p. 7).

Sukcesis ankaŭ la 52-a Internacia Junulara Kongreso, organizita de Germana E-Junularo (nov., p. 188). La sola malbona novaĵo el tiu IJK estis ke pro iom tro alta atendo pri la nombro de partoprenontoj ĝi fine havis malgajnon de ĉ. 8500 gld. Tiu deficiito ne influas la spezokonton de TEJO, ĉar ĝin kompensas Rezervo IJK (ne konfuzenda kun Fondaĵo Partopreno IJK, kiu siaflanke suferis pro manko de enspezoj en 1996).

La individua membraro de TEJO kreskis, ĉefe dank' al la varbado dum la IJK. Ankaŭ subtenis multaj Patronoj: 108, t.e. unuafoje pli ol 100. Aliĝis nova landa sekcio, Portugala E-Junularo, sekve TEJO nun havas 37 landajn sekciojn.

TEJO rigardas la estontecon kun sufiĉa fido. Videblas nova aktiveco en pluraj kampoj, vigliĝas aŭ revigliĝas landaj sekcioj en pluraj mondopartoj, kaj kutime akireblas financa subteno por ĉiu agado.

Ĉe la kruciĝo de edukado kaj instruado estis la interŝanĝo de infanoj (dec., p. 216) inter Katalunio kaj Bosnio, kaj Kievo (Ukrainio) kaj Tuluzo (Francio). Orfoj el Sankt-Peterburgo (Rusio) feriiis en Danio, kie Esperanto fariĝis ne nur la komuniklingvo sed ankaŭ portanto de solidareco.

La Internaciaj Ekzamenoj de UEA/ILEI havis nombre malpli bonan sukceson ol kutime (majo '97, p. 87). Okazis 12 sesioj en 8 landoj, kun 30 sukcesintoj en la elementa kaj 15 en la meza niveloj. Por Koresponda Servo Mondskala (marto '97, p. 46) la jaro signifis grandan kreskon de la agado, dank' al efika diskonigo de tiu malnova servo de UEA en la E-gazetaro: 579 petleteroj kompare kun 362 en 1995.

Bedaŭrinde estis ke la alvoko al eŭropa kunlaboro (feb., p. 24) ne ricevis reagon. Tio pravas la malfacilecon kunordigi plurlandan agadon, eĉ se la koncernaj respondeculoj en ILEI kaj UEA opinias tion ebla.

Kulturo: Jaro de teatro, vortaroj kaj tradukoj

(Respondeca estrarano: Lipari ĝis la UK, poste Triolle.)

Per siaj rimedoj, UEA klopodas helpi la disvolvon de aŭtente Esperanta kulturo kaj informi plej vaste pri ties atingajoj. En ĉi tiu revuo tion celas i.a. “Laste aperis”, “Foliume” kaj la recenzoj. UEA atentigas landajn asociojn pri kulturaj aranĝoj en kiuj Esperanto povus trovi lokon (ekz. kulturaj ĉefurboj eŭropaj), kompilas kaj disponigas listojn pri diversaj artistoj, ekz. laste pri skulptistoj.

sian ĉiujaran premion al Paul Gubbins pro lia lernolibro (1993) *Kunvojaĝu* (recenzita en feb., p. 27).

ELDONADO

Ĉi-sube ni mencias titolojn same el 1995 kiel el 1996, ĉar surmerkato de libroj en Esperantujo estas ofte longdaŭra procezo. Pri la eldonaĵoj de UEA mem vd. “Administrado: Servoj”, p. 107.



Al unu breto da Auld-verkoj (50 titoloj) en 1996 aldoniĝis la Tolkien-traduko *La du turegoj*.

Ĉefa montrofenestro kultura estas la programo de la UK, ĉi-jare stampita de la E-teatra jubileo (vd. “Kongreso”, p. 107), sed rimarkindas la vigleco de festivaloj kiel la 8-a EOLA en Bjelorusio (jun., p. 119), la 5-a Kultura E-Festivalo en Danio (okt., p. 177) kaj aliaj aranĝoj, ekz. la 15-a Internacia Literatura Forumo (okt., p. 179).

PREMIOJ

Por Belartaj Konkursoj (okt., p. 169) la pasinta jaro montriĝis, post malriĉa 1994 kaj abunda 1995, pli averaĝa: partoprenis 109 verkoj, el kiuj 16 ricevis premion kaj 1 honoran mencion. Tamen, kvar branĉoj restis sen unua premio, ne aperis premiinda Nova Talento, kaj plejparte la ĵurio rekompencis nomojn jam konatajn (M. Nervi, S. Johansson, G. Lagrange k.a.). En 1996 konstantiĝis la aljuĝeblo de tri premioj en la esea kaj kanta branĉoj, en kiuj ĝis 1994 ekzistis nur po unu premio.

Fondaĵo Grabowski premiis la geaktorojn Belka Beleva, Jadwiga Gibczyńska kaj Jerzy Fornal, kaj historiistino de la E-teatro, Zofia Banet-Fornalowa. Premio Deguĉi rekomencis la vivoverkon de Dimitar Terziev, gvidanto de la Internacia Ĥoro dum 16 UK-oj kaj prezidanto de Muzika E-Ligo. Organiza Societo de Internaciaj E-Konferencoj (OSIEK) aljuĝis

La leksikografia ondo de 1995 plu ruliĝis pasintjare: post longa laboro pretiĝis la vortaroj itala-Esperanta (C. Minnaja) kaj hungara-Esperanta (I. Szerdahelyi – I. Koutny); ĉi tiu nomas sin “meza”, sed ŝajnas tia nur kompare al la itala giganto. Aperis *E-mongola vortaro* de S. Jansanĝav kaj, kun la subteno de Fondaĵo Saliko, dua eldono de *Vortaro E-Suahila* de J. Knappert.

En la kampo beletra, 1996 ŝajnis jaro plie de tradukoj ol de originaloj: Edistudio atutis per *La serĉado de la perfekta lingvo* de Eco kaj *La metamorfozo* de Kafka, aperinta en la serio “Oriento-Okcidento”, kiu celas kontribui al programo de Unesko por reciproka studo kaj aprezado de kulturoj. LF-Koop lanĉis *Dekameronon* de Boccaccio, Ĉina E-Eldonejo la duan volumon el la triparta *Ruĝdoma sonĝo*; Sezonoj (vd. majo '97, p. 96) alportis *La du turegoj* de Tolkien, Fonto eldonis *La oldulo kaj la maro* de Hemingway kaj Impeto publikigis *Pikniko ĉe vojrandoj* de la fratoj Strugackij. Freŝajn originalaĵojn daŭre plej flegis la formale ĉesinta Pro Esperanto (Vieno), kiu plu eldonas sub la marko Internacia E-Muzeo: de ĝi venis la novelaro *La aĵoj kaj la sezonoj* de U. Becker, la poemaro *El miaj sonoraj soloj* de M. Fernández kaj la romanoj *Tena* de S. Štimec kaj *La armeoj de Paluzie* de M. de Seabra.

Lingvo, esploro kaj dokumentado: Stimuloj lingvopolitikaj

(Respondecaj estraranoj: Wandel, pri lingvo kaj Akademio; Fettes, pri CED.)

La kelkara diskuto pri la lingvopolitiko de UEA kulminis en unutaga seminario tuj antaŭ la 81-a UK (sep., p. 150). Bonaj prelegoj kaj stimulaĵoj diskutoj kondukis al taskado de la komitata komisiono pri lingvopolitiko (Detlev Blanke, Mark Fettes, Amri Wandel, YAMASAKI Seikō) ellabori konkretan laborplanon diskutotan dum la 82-a UK, kiu antaŭvidu kunlaboron inter la Centro de Esploro kaj Dokumentado (CED), Akademio de Esperanto kaj aliaj gravaj movadaĵoj. La aktoj de la seminario publikigos en iu modesta formo.

CED registris tre sukcesan jaron. Regule aperadis ĝia ĉefa revuo *Language Problems and Language Planning* (red. Klaus Schubert, Humphrey Tonkin, Probal Dasgupta), kiun nun enestas ankaŭ rubriko pri interlingvistiko (red. Fettes), kaj la grava esplorbulteno *Informilo por interlingvistoj* (red. D. Blanke). La 14-a Konferenco pri Lingvo kaj Komunikado, organizita en Novjorko kunlabore kun la loka oficejo de Unesko, allogis aparte multajn instruistojn pro sia temo "Lingvoj kaj tutmonda edukado" (jun., p. 102). Ĉe University Press of America aperis

la dua kolekto de referaĵoj el antaŭaj konferencoj, *Language Status in the Post-Cold-War Era* (red. K. Müller, sep., p. 155). Kadre de la UK, la 19-a Esperantologia Konferenco prezentis interesan kaj altkvalitan prelegaron pri sociaj kaj lingvaj aspektoj de la Esperanto-kulturo (sep., p. 150).

Estrarano Wandel, ano de la Akademio de Esperanto, iniciatis kaj prizorgis rubrikon de la Akademio en ĉi tiu revuo, kiu prezentis la laboron de la akademianoj, kaj ankaŭ celas esti podio por diskutoj kaj reagoj de legantoj pri la Akademio. Ĝi aperis ses fojojn.

Publikiĝis nur unu kajero de Esperanto-Dokumentoj: *L'espéranto et le plurilinguisme de l'avenir*, plena franclingva originalo de la intervjuo kiun Umberto Eco donis en 1993 al István Ertl kaj François Lo Jacomo.


Faka agado kaj scienca aplikado: Novaj servoj lanĉitaj

(Respondeca estrarano: Wandel.)

En la Praga UK estis lanĉitaj du novaj servoj por la Fakaj Asocioj (FA-j): unuafoje okazis Faka kaj Scienca Forumo, libera podio por senpera kontaktado kaj sinprezentado de FA-j, kun abunda partopreno de individuoj kaj FA-reprezentantoj (sep., p. 151). Premieris ankaŭ Faka Ĝiĉeto, kie FA-j povis alterne prezenti sin, senpage, dum la tuta kongresa semajno. Tiun eblon profitis deko da FA-j, speciale tiuj dum la UK aliĝontaj al UEA aŭ ekhavontaj kun ĝi kunlaborajn rilatojn (vd. "Ĝeneralajoj", p. 105).

Post sukcesa kunlaboro de Akademio Internacia de la Sciencoj en la Internaciaj Kongresaj Universitatoj (IKU) de 1994 kaj 1995, en Prago unuafoje la kompleta studprogramo de AIS-konferenco estis kunigita kun la programo de UK. La kongresanoj povis sen aparta aliĝo partopreni la ses kursojn kaj la liberajn prelegojn de la 16-a Sanmarina Universitata Studsesio (SUS, 21-30 jul.), kiuj okazis paralele al la UK kaj ankaŭ iom post ĝi. La du aranĝoj — SUS kaj IKU — havis komunan inaŭguron. La du 8-horajn kursojn de AIS/IKU prezentis Reinhard Selten (ludoteorio) kaj Ignat Bociort (estetiko).

Tuj post la UK okazis, sub la aŭspicioj de Unesko, seminario organizita de



Reinhard Selten aplikis ludoteorion al lingvolernado.

Bratislava Internacia Centro por Familiaj Studoj, kunlaboranta kun Rondo Familia de UEA, pri "Multkulturaj familioj de la nuntempa Eŭropo" (okt., p. 170). La prelegoj aperis en samtitola libro, kun la salutmesaĝo de Joseph Poth (Unesko).

Pli ol 500 sciencistoj interŝanĝis fakajn spertojn en la 5-a Internacia Akademia Konferenco pri Scienco kaj Tekniko en Esperanto (2-7 sept., Pekino; dec., p. 217).

Jarfine malfondis sin Universala Ligo, fondita de Andreo Cseh en 1942 por antaŭenigi mondfederalismajn ideojn kaj lanĉinta la internacian monunuon stelo. Parto el ĝia kapitalo (po 7100 gld.) iris al Fondaĵoj Afriko kaj Ameriko de UEA.

Ĉi tiu revuo regule publikigis novaĵojn kaj informojn pri faka agado, kaj aparta rubriko — pli ofte aperanta ol alia — detale prezentis kvin fakajn asociojn.

Menciindaj fakaj verkoj de la jaro estas i.a. (ni nomos titolojn same el 1995 kiel el 1996, pro malsamaj datoj de surmerkato): *Enkonduko en la teorion de lingvaj ludoj* de R. Selten kaj J. Pool, la sociologiaj *Kiu parolas Esperanton?* (analizo de F. Stocker pri la germana E-movado) kaj *Esperantistoj kaj normo* (enketo de M.-T. Lloancy pri la parola E-normo), *Germanaj bieroj kaj bierkulturo* de H. Schicke, kaj ne malpli ol 6 libr(et)oj de André Cherpillod, pri temoj de katarismo ĝis Esperanta vortfarado. En traduko aperis la "konfuceana Biblio" *Analektoj de Konfuceo, Bildstria gvido al genetiko kaj Historio de Japanio kaj Koreio*. La litova poŝto eldonis 6-lingvan *Internacia poŝterservo* (A. Piliponis); aliaj terminaroj inkluzivis la dudirektajn *Fervoja terminaro* E-italan kaj E-serban, la forsto-fakan *Lexicon silvestre, Ilustrita vortaro pri heraldiko* de N. Starodubcev, kaj 1000 nomojn proponatajn de Asocio por la Enkonduko de Nova Biologia Nomenklaturato.


Financaj aldonaĵoj: Spezokonto de Universala Esperanto-Asocio por la jaro 1996

(Ĉiuj sumoj estas en nederlandaj guldenoj.)

KOSTOJ

Rezulto 1995	Buĝeto 1996	Rezulto 1996
477628	486000	481247
97927	92500	84471
19465	21500	17542
1899	1500	1723
0	0	-4819
7000	5000	7000
603919	606500	587164
18896	19000	10554
5750	6000	6044
8250	7000	5843
8169	5500	5582
6818	6500	6403
1500	1500	1500
591	500	1211
6949	6500	7390
-5741	-4400	-5992
51182	48100	38535
10093	10000	11162
515	500	551
1361	1500	1410
7912	8000	7728
6036	6300	6093
2443	2500	3351
-1712	-1500	-2117
26648	27300	28178
36278	38500	36540
48298	54000	47702
23660	23000	23317
4404	5250	4036
-9584	-12000	-10455
103056	108750	101140
20607	22000	14637
18551	18000	19409

4867	Grafiko	6500	3844
1281	Kovertoj	1600	1435
-16060	Anoncoj	-15000	-15991
29246	Jarlibro, nete	33100	23334
12841	Preskostoj <i>Kontakto</i>	13500	12950
7336	Afranko/ekspedo	7750	8866
645	Kovertoj	650	536
8825	Grafiko	10300	8670
12750	Redakto	13000	13000
-606	Anoncoj	-450	-591
41791	Kontakto, nete	44750	43431
15261	Estraro (vojaĝado)	10000	11268
1813	Estraro (korespondado)	3000	2303
4461	Oficistoj (vojaĝado)	4000	2675
3662	Vojaĝado (UK)	5000	2095
25197	Vojaĝoj/korespondado	22000	18341
3000	Edukado	3000	3000
1333	Informado	3500	2445
3215	Eksteraj rilatoj	1000	3398
379	Komisiitoj, vojaĝoj	1000	1987
576	Komisiitoj, korespondado	500	726
8503	Movada evoluigo	9000	11556
3190	Bankokostoj	2500	2337
-3648	Kurzdiferencoj	0	-7455
6694	Reprezentado	3500	3178
-4063	Antaŭaj jaroj	0	-5470
156	Diversaj kostoj	500	88
2329	Ĝeneralaj kostoj	6500	-7322
6881	Amortizo, domo	6925	6744
6355	Amortizo, aparatoj/mebloj	3715	3816
1406	Amortizo, telefonsistemo	1055	1055
13186	Amortizo, komputiloj	8520	13750
9421	Amortizo, programaro	9185	7443
37249	Amortizo entute	29400	32808
929120	Sumo de la kostoj	935400	877165



KOSTOJ					
Rezulto		Buĝeto	Rezulto		
1995		1996	1996		
5492	Membroj Gvidlibro	5925	5578		
45390	Membroj Jarlibro	44500	50057		
261033	Membroj-Abonantoj	273300	251802		
46754	Dumvivaj Membroj	45000	46657		
11018	Membroj Jarlibro (junaj)	11050	15210		
19801	Membroj-Abonantoj (junaj)	21300	20522		
389488	Kotizoj de individuaj membroj	401075	389826		
17733	Aligitaj membroj	19300	18302		
3708	Aligitaj membroj junaj	4600	3407		
8526	Abonoj <i>Esperanto</i>	9500	8414		
1250	Kolektivaj abonoj <i>Esperanto</i>	1500	1140		
14907	Abonoj <i>Kontakto</i>	16000	15574		
6848	Kolektivaj abonoj <i>Kontakto</i>	7750	7759		
48751	Societo Zamenhof	40000	44669		
5626	Fakaj Organizoj	6025	6014		
-6588	pago al TEJO	-7200	-7558		
490249	Kotizoj	498550	487547		
255476	Vendoj de la Libroservo	258500	276796		
-159841	Kosto de varoj venditaj	-154750	-178479		
95635	Libroservo, malnete	103750	98317		
-5000	Katalogokostoj	-5000	-5000		
-2124	Al stokrezervo	0	-2382		
6083	Abonfako	6500	4734		
94594	Libroservo, nete	105250	95669		
25608	Vendoj de Eldona Fakoj	36000	30819		
-5046	Aldonoj (novaj libroj)	-30000	-10073		
-13311	Ŝanĝo stokvalora	8000	-8635		
-4172	Al stokrezervo	0	-3883		
-1228	Tantiemoj	-2000	-2852		
1851	Eldona Fakoj, nete	12000	5376		
49149	Grafikaj servoj CO	52000	50855		
19165	Aliaj servoj CO	25000	20339		
0	Kompenso – programado	3000	0		
1500	Institucio Hodler	1500	1500		
30500	Kompenso Propaganda Konto	34000	34000		
100314	Servoj kaj Kompensoj	115500	106694		
147976	Kotizoprocenĵo 81-a UK	130000	164252		
0	Rezervo	0	-47000		
28332	Turismo	15000	2579		
28660	Rento, nete	18000	25717		
5676	Donacoj al la Ĝenerala Kaso	15000	10829		
1749	Aliaj enspezoj	1500	2203		
212393	Diversaj enspezoj entute	179500	158580		
899401	Sumo de la rimedoj	910800	853866		
29719	Saldo	24600	23299		
929120	Sumo de la kostoj	935400	877165		
			Ekipaĵoj & mebloj	23173	20220
			Komputilaj aparatoj	28707	32088
			Programaro	28262	22330
			Telefonsistemo	4219	3164
			en Novjorko	1	1
			Maŝinaro ktp	84362	77803
			Blokitaĵoj monrimedoj	4097	3473
			Akcioj	384382	524968
			Obligacioj	402340	755600
			Miksaj	650598	920604
			Valorpaperoj entute	1437320	2201172
			Stokoj libroservaj	212396	238191
			Stokoj, Eldona Fakoj	417213	388281
			Stokrezervo	-26296	-8698
			Presadoj, materialoj k.s.	18726	16842
			Provizoj entute	622039	634616
			Ricevotaj rimedoj	136592	118207
			Antaŭpagitaj kostoj	12921	9763
			Debitoroj	239153	243559
			Debitoroj ktp entute	388666	371529
			Ŝparkontoj kaj deponoj	1736539	1501039
			Kurantaj bankokontoj	157184	197138
			Kasoj diversaj	7571	4679
			Kasoj/bankokontoj entute	1901294	1702856
			Sumo de la aktivoj	4774959	5321886
			PASIVAJ		
			Kapitalo	334525	358458
			Saldo de spezoj	-29719	-23299
			Kapitalo Azio	524178	601443
			Kapitalo, Ĝenerala & Azio	828984	936602
			Kapitalo Dumvivaj Membroj	765584	899482
			Rezervo, debitoraro	19584	21877
			Kongresa Rezervo	93434	117486
			Rezervo IJK	25000	25000
			Rezervo, emeritaj oficistoj	71987	82356
			Aliaj sumoj rezervitaj	66133	79399
			Rezervoj entute	276138	326118
			Belarta Fondaĵo	130775	136166
			Fondaĵo Afriko	2	3491
			Fondaĵo Ameriko	26643	37538
			Fondaĵo Azio	-9796	-3441
			Fondaĵo Biblioteko	20391	19517
			Fondaĵo Canuto	-3085	5951
			Fondaĵo Grabowski	48669	52963
			Fondaĵo Junularo	801	20865
			Fondaĵo Saliko	70884	74045
			Fondaĵo Wüster	3418	3418
			Konto Espero	14404	13671
			Propaganda Konto	69363	77456
			Triamonda Kongresa Fondaĵo	65096	63985
			Volontula Fondaĵo	69863	69014
			Fondaĵoj entute	507428	574639
			Antaŭricevitaj rimedoj	122213	183312
			Pagotaj kostoj	72154	76598
			Pendantaj spezoj	5967	5371
			Kreditoroj	1396610	1448164
			Deponoj de membroj	799881	871600
			Kreditoroj k.s. entute	2396825	2585045
			Sumo de la pasivoj	4774959	5321886

Bilanco de Universala Esperanto-Asocio je la 31-a de decembro 1996

(por komparo aperas ankaŭ la stato fine de 1995)

AKTIVAJ	1995	1996
Domo, Roterdamo	337180	330436
Tereno Aspremont	1	1
Nemoveblaĵoj	337181	330437

Fino de la Estrara Raporto 1996

Falo aŭ stabileco?

En 1996 UEA nombris 20 591 membrojn, kompare kun 43 642 en 1987. Tiu duoniĝo de la membraro ŝajnas forta bazo por kritiko. Aleksander Korĵenkov statistike lupeis la esencon de la afero.


Estas konate ke UEA distingas individuajn membrojn (IM), kiuj mem pagas sian kotizon, kaj aligitajn membrojn (AM), por kiuj pagas la landaj asocioj (LA) aliĝintaj al UEA. Revuante tiujn kategoriojn, ni vidas ke la kvanto de IM-j apenaŭ ŝanĝiĝas: 7291 en 1987, kaj 7277 en 1996. Sed la kvanto de AM-j en la lastaj 9 jaroj falegis: de 36 351 al nur 13 314 (–63%). Dum daŭre la sama kvanto da individuoj aliĝas al UEA, la kotizoj asociaj preskaŭ trioniĝis. La kaŭzo de ĉi tiu ŝrumpo tamen situas ekster nia lingvokomunumo.

En la jaroj 1980-aj pli ol duono de la asociaj kotizoj venis el ses “popoldemokratiaj” landoj: Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Germana DR, Hungario, Jugoslavio kaj Pollando, kies LA-j ĝuis diversmanieran ŝtatan subtenon. La asocioj reciprokis per konforma “internaciisma” kaj “propaganda” laboroj. Cetere, per la AM-kotizoj tiel estis “aĉetataj” lokoj en la Komitato de UEA. Tial, kvankam nur okono de la IM-j loĝis en la ses nomitaj landoj, tie registriĝis, misproporcie, pli ol duono de la AM-j.

Post la falo de la komunismaj reĝimoj la novaj aŭtoritatoj ne plu bezonis “propagandi la socialismajn atingojn”, nek havi kelkajn komitatanojn en UEA. Do, la LA-j en ekspopoldemokratioj ekrajtis mem decidi

pri sia mono: ĉu pagi al UEA por kelkaj miloj da membroj (realaj aŭ surpaperaj), ĉu dediĉi ĝin al internaj bezonoj. Ne mirinde, ili elektis la malpli prestiĝan duan vojon, kaj jen la misproporcio malaperis: pasintjare el tiu landaro venis ĉ. okono same de la IM-j kiel de la AM-j.

Por komparo ni vidu ankaŭ la statistikon de 1980, jaro eble pli reprezentanta ol 1987, ĉar en ĉi tiu la pollanda LA, gastiganta la jubilean UK-n, pagis por 9118 AM-j (en 1996 – nur por 200). En la ciferoj por 1996 estas konsiderataj la nunaj dek ŝtatoj surloke de la antaŭaj ses “popoldemo-



Ni komparu nun la evoluon de la membraro en tiuj ses landoj kaj en la t.n. “Granda Sepopo” de Britio, Francio, Germanio, Italio, Japanio, Kanado kaj Usono. Ni vidos ke en la tuto de ĉi lastaj la kvanto de IM-j kreskas fone de la malkresko de la asociaj kotizoj (ĉefe pro la asocia membrofalo en Italio).

kratiaj”, sed ne plu GDR/Germanio.

La supra analizo montras ke la reala membraro de UEA en la lastaj jaroj restas stabila (aŭ stagnanta). La laŭŝajna “falo” signifas nur malaperon de la subvenciado de LA-j en la ses ekskomunismaj landoj orient-eŭropaj.

Aleksander Korĵenkov
(Laŭ La Ondo de Esperanto)

JUNULARO

IJK por duonmilo?


Fine de majo la 53-a Internacia Junulara Kongreso (Assisi, Italio, 24-31 julio) nombris jam ĉ. 400 aliĝintojn el 25 landoj sur 4 kontinentoj, kio verŝajne partoprenon de pli ol 500 homoj. Subtenas la IJK-n la prezidento de Italio, Oscar Luigi Scalfaro, kaj la regiono Umbrio. Ne-ĉeestantoj povos partopreni la kongreson virtuale, dank’ al Interreto, ĉe la TTT-paĝoj de Itala E-Junularo: www.arpnet.it/~esper/iej/iej.htm, mesaĝante al la kongreso per: esper@arpnet.it. Jam nun vi povas kontakti Federico Gobbo ([\[ibm.net\]\(mailto:ibm.net\)\), kiu gvidos laborrondon pri kunordigado de TTT-paĝoj mondscale. Aliĝu ĉe: Alessandro Amerio, via Cumiana 45, IT-10141 Torino; ☎+39/11/385-42-00; ☎11/545-731; ✉\[a.amerio@agora.stm.it\]\(mailto:a.amerio@agora.stm.it\). \(F. Amerio\)](mailto:fgobbo@</p>
</div>
<div data-bbox=)

En La Chaux-de-Fonds (Svislando) TEJO seminarios de la 4-a ĝis la 11-a de oktobro pri “Edukado al paco”. Se vi interesiĝas partopreni, anoncu vin al: Marion Belisle, Rue de la Serre 28, CH-2300 La Chaux-de-Fonds, Svislando; ☎+41/32/913-02-46; ✉belisle@compuserve.com.

IKU-tekstoj haveblaj en UK

En multaj sciencaj kaj profesiaj konferencoj jam antaŭ la prelegoj estas haveblaj ties tekstoj, por ke la aŭskultantoj povu pli bone sekvi la prelegojn kaj profiti de ili. En Adelajdo UEA realigos tion rilate la prelegojn de Internacia Kongresa Universitato: la tekstoj aĉeteblos kontraŭ simbola pago en la libroservo, en la IKU-inaŭguro kaj antaŭ ĉiu prelego. Ĉiuj IKU-prelegantoj do sendu sian tekston, rete aŭ sur disketo, al la estrarano pri scienca agado kaj al la CO, antaŭ la fino de junio.

Laste aperis



Ĉirkaŭ la skolo Analiza. Rikardo Ŝulco (1906) kaj aliuloj. Paderborno: Esperanto-Centro, 1997. 477p. ISBN 3 922570 79 8. 21cm. Kolekto de artikoloj, recenzoj kaj leteroj. Laŭ la eldonisto, adiaŭa verko de la aŭtoro. 52,50 gld.

Enkonduko al la problemoj de la programaja inĝenieriko. Reinhard Fössmeier (1955). Dulingva: E-germana. Jelenia Góra: Libro, 1993. 37p. ISBN 83 85033 07 3. 20cm. "Sciencaj Aktoj" de AIS, Vol. 3/1993. 7,20 gld.

Esperanto vivos malgraŭ la esperantistoj. Zlatko Tišljar – Pajo (1945). Maribor/Zagreb: Inter-kulturo/Libro TIM, 1997. 177p. ISBN 961 6075 16 0. 21cm. Diskutigaj artikoloj, eseoj kaj studoj (1969-96) "pri la esperantista popolo", pri E-edukado k.a. temoj. 27,00 gld.

Falantaj muroj kaj aliaj rakontoj. Trevor Steele (1940). Vieno: IEM, 1997. 160p. ISBN 3 901752 04 X. 23cm. Travivaĵoj de la aŭtoro en Sovetio, Pollando kaj eks-GDR en 1990-91, plus kelkaj en aliaj landoj kaj tempoj. 24,00 gld.

Filozofio de la instruoj de Islamo, La (1896). Hazrat Mirza Ghulam Ahmad de Qadian. El la angla trad. Roel G. Haveman. Islamabad/Tilford: Islam International Publications Ltd, 1996. 104p. ISBN 90 71624 10 2. 21cm. Enkonduko al islamismo, fare de la fondinto de la Ahmadiyya-Movado. Tradukita en 52 lingvojn. 12,00 gld. Triona rabato ĉe aĉeto de min. 3 ekz-oj.

L'homme qui a défié Babel. Ludwik Lejzer Zamenhof. René Centassi, Henri Masson. Antaŭparolo de Louis C. Zaleski-Zamenhof. Francilingva. Paris: Ramsay, 1995. 401p. ISBN 2 84114 114 4. 23cm. Biografio de Zamenhof, kun multaj informoj pri la frua evoluo de la E-movado. 49,50 gld.


Ilustrita vortaro pri heraldiko. Illustrirovannyj slovar po geraldike. Nikolaj Starodubcev (1938). Doneck: la aŭtoro, 1996. 345p. ISBN 5 87420 084 8. 21cm. Bind. 1005 terminoj — ĉiu kun sia bildo — en la rusa, ukraina, angla, Esperanto, franca, germana kaj latina. 39,00 gld.

Lupo sur Kapitolo kaj aliaj noveloj, La. Stellan Engholm (1899-1960). Vieno: IEM, 1997. 93p. ISBN 3 901752 05 6. 23cm. Naŭ rakontoj kaj noveloj originalaj de la sveda klasikulo, kiuj unuafoje aperas libroforme. 21,00 gld.

Por ĝuste uzi Esperanton. Marcel Leereveld. Bakers Hill & Beverley WA: Bookleaf, 1997 (2-a, pliampleksigita eld.). 95+19p. ISBN 1 876042 09 5. 30cm. "Diversspecaj lumigoj de interesaj E-gramatikaĵoj", aperintaj en E-gazetoj "por la daŭra pureco de nia lingvo". 48,00 gld.

Reĝo sen distriĝo (1946). Jean Giono (1895-1970). El la franca trad. Pierre du Cheyron de Beaumont (1923-81). Paris: UFE, 1997. 57p. 21cm. Dua kaj fina parto de morala rakonto, komence detektivromaneca, pri la krueleco de la homo. 13,50 gld.

Struktura kaj socilingvistika esploro de Esperanto. Memore al profesoro István Szerdahelyi. Redaktis Ilona Koutny kaj Márta Kovács. Budapest: Steleto/ILEI, 1997. 161p. 21cm. Referaĵoj, lingvistikaj kaj sociologiaj, de esperantologia konferenco (1988): W. Blanke, D. Maxwell, C. Piron, G. Silfer, B. Vaha k.a. Aldone: etimologia artikolo el la postlasaĵo de I. Szerdahelyi. 18,00 gld.



**Aŭstralia aŭtoro
pri Orienta Eŭropo**

Ŝakaj pozicioj (Vol. 1). Streĉaj momentoj el partioj luditaj vaste en la mondo en 1995. Klarigoj de Margeir Pétursson, grandmajstro. Red. Pétur Yngvi Gunnlaugsson. Reykjavík: Plekto, 1997. 64p. 30cm. Ringe bind. 273 ŝakpartioj klarigitaj. 27,00 gld.

DIVERSAĴO

Kasedo: Jen vivo mia. Kantas Gafur Mirzabajev (Uzbekio). Taŝkent, 1996. 46 min. 7 kantoj Esperantaj kaj 7 de diversaj popoloj. 18,00 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 17,5% pro la aldonvalora imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5 gld. Antaŭdankon pro via mendo!

Fake



• Instruado: Argentina ekzameno

Lige al la 51-a Argentina Kongreso kaj 4-a Interlanda Konferenco pri Instruado (9-12 okt., Bonaero, Argentino) okazos sesio de la Internaciaj Ekzamenoj de UEA/ILEI. Pri la ekzamenoj ĝenerale informas: Hans ten Hagen, Middenweg 587, NL-1704 BH Heerhugowaard, Nederlando; ☎+31/72/571-79-18; ✉574-76-70; ✉ten.hagen.esperanto@pi.net.

• Kristanismo: KELI-kongreso

La 47-a kongreso de Kristana E-ista Ligo Internacia okazos en Zalaegerszeg (Hungario), de la 29-a de junio ĝis la 6-a de julio. Informoj: Irén Bagi, Baross u. 54/b, HU-1202 Budapest, Hungario; ☎+36/1/283-65-66. (E.A. v. Dijk-Kuperus)


• Literaturo: Konkurso Liro-97

Urala E-ista Societo kun la redakcioj de *Ruslanda Esperantisto* kaj *La Ondo de Esperanto* invitas sendi en 3 ekz-oj, ĝis la 15-a de julio, konkursojn en nelimititaj kvanto kaj amplekso, ne pli frue publikigitajn aŭ premiitajn, en jenaj branĉoj: originalaj prozo kaj poezio, traduka prozo (noveloj) el la ciklo *Povesti Belkina* de Puŝkin), poezio tradukita el la rusa, kaj recenzo pri la poemaro *Kvarteto* (Sezonoj, 1996). Adreso: ab. ja. 162, RU-620014 Jekaterinburg-14, Ruslando; ✉vak@nw.sbank.e-burg.su. Subskribu per pseŭdonimo kaj aldonu slipon kun la aŭtentaj nomo kaj adreso. La rezultoj estos anoncitaj kadre de la renkontiĝo "Eŭropo-Azio '97" (Jekaterinburgo, 9-17 aŭg.). La laŭreatoj (po unu en ĉiu branĉo) ricevos valorajn libropremiojn. (V. Kulakov)

• Naturamikoj: Post 5-jara paŭzo

Startinta antaŭ 30 jaroj, post kvin-jara paŭzo denove okazos, la 26-an fojon, Internacia Renkonto Naturamika, en Abaliget apud Pécs (Hungario), de la 15-a ĝis la 21-a de aŭgusto. Informas: E-Asocio de Baranya, pf. 98, HU-7601 Pécs, Hungario; ☎+36/72/333-123.

Esperanto en radio



Internaciaj radioelsendoj en Esperanto (horoj laŭ UTC)

Ĉiutagaj elsendoj

04:30-05:00*	Pola R. Varsovio	Sat (1)	Eŭropo
11:00-11:27	Ĉina R. Internacia	7170, 9570	Azio Orienta, Japanio, Koreio
13:00-13:27	Ĉina R. Internacia	11840, 11600	Azio Sudorienta
13:30-14:00*	Pola R. Varsovio	7145, 7285, 6000, Sat (1)	Eŭropo
18:00-18:30*	Pola R. Varsovio	6035, Sat (1)	Eŭropo
19:25-19:30*	Pola R. Vars./WRN	Sat (2)	Eŭropo
20:00-20:27	Ĉina R. Internacia	7405, 9965	Eŭropo
20:30-20:55*	Pola R. Varsovio	7270, 6035, 6095	Eŭropo
22:30-22:57	Ĉina R. Internacia	9860, 6950	Latin-Ameriko, Eŭropo

Dimanĉaj elsendoj

04:05-04:30*	R. Aŭstria Internacia	6155, Sat (3)	Eŭropo
07:00-07:30	R. Havano Kubo	9820	Azio Pacifika, Ameriko Norda
14:05-14:30*	R. Aŭstria Internacia	6155, 13730, Sat (3)	Eŭropo, Afriko Okcidenta
15:00-15:30	R. Havano Kubo	11760	Ameriko, Karibio
19:20-19:30*	R. Vatikana	527, 1530, 5882, 4005, Sat (4)	Eŭropo
19:20-19:30*	R. Vatikana	Sat (5)	Ameriko
19:30-20:00	R. Havano Kubo	13715	Eŭropo, Mediteraneo
22:00-22:30	R. Havano Kubo	13715	Eŭropo, Mediteraneo
23:05-23:30*	R. Aŭstria Internacia	9870	Latin-Ameriko
23:30-24:00	R. Havano Kubo	11760, 11875, 6070	Ameriko, Karibio

Dum aliaj tagoj

19:20-19:35*	R. Vatikana	1611, 6185, 7365	Eŭropo (merkredo)
19:20-19:35*	R. Vatikana	Sat (6)	Azio, Afriko (merkredo)
19:30-19:45*	Estona Radio	5925	Eŭropo (marde)
20:00-20:20	RAI Internacia	7180, 9755, Sat (7)	Eŭropo (sabate)

*ekde 25 okt. 1997 unu horon pli malfrue (ĉar konstanta laŭ Meza Eŭropa Tempo)

Satelitaj indikoj

- (1) Eutelsat II F6 13 E (Hot Bird), 11.476 GHz Hpol (TVPolonia), 7.38 MHz
- (2) Astra 19.2 E, 11.538 GHz Vpol (VH1), 7.38 MHz (World Radio Network 1 Europe, 4-minuta realsendo de la posttagmeza programo de Pola Radio; disaŭdigita tra multaj urbaj kablo-retoj)
- (3) Astra 19.2 E, 11.141 GHz Hpol (BFS 3), 8.10 MHz, per Astra Diĝita Radio (ADR)
- (4) Eutelsat II F1 13 E, 10.987 GHz Vpol (NBC), 7.38 MHz (Eŭropo)
- (5) Intelsat 603: 34.5 W, 4097.75 MHz LHCP, aŭda kanalo A-1 (Atlantiko, Amerikoj)
- (6) Intelsat 704: 66 E, 4152.45 MHz RHCP, aŭda kanalo I-1 (Azio, Afriko)
- (7) Eutelsat 13 E (Hot Bird 1), 11.446 MHz Vpol (Rai Due), 7.56 MHz

fonto: OSIEK-AERA, Amikaro de Esperanto en Radio
<http://members.aol.com/OSIEK/AERA>

Muzika konkurso

Lige kun la datrevenoj en 1997 de la komponistoj Szymanowski, Schubert, Betoven, Brahms k. a., la Esperanto-Redakcio de Pola Radio prezentas ĝis la fino de novembro informojn, intervjuojn ktp pri Esperanto kaj muziko, kaj lanĉas konkurson por atentigi la esperantistaron pri la ligoj de Esperanto kun muziko. Por konkursi sufiĉas respondi al unu el jenaj demandoj: Kiu el la originalaj poemoj de Zamenhof fariĝis kanto-teksto? Kiu al vi konata kantisto (aŭ grupo, orkestro) kantis aŭ kantas en E-o? Kiu komponisto havas ĉi-jare rondciferan datrevenon de sia naskiĝo aŭ morto? Kiun komponaĵon de tiu aŭtoro vi konas? Respondu al: Pola Radio, Esperanto-Redakcio, Skrytka 46, PL-00-977 Warszawa, Pollando; ☎ +48/22/645-59-17; ✉ pettyn@radio.com.pl.

La anonco de la rezultoj kaj premiitoj sekvos je la 15-a de decembro, Zamenhof-tago.

Andreo Pettyn (Pola Radio)

Lokaj iniciatoj

Deziras starigi Esperanto-programon kaj bonvenigas helpon, konsilojn, revuojn, kasedojn ktp:

1. PakEsA Esperanto Radio-Klubo (en Jhelum, loka klubo de Pakistana Esperanto-Asocio), kies juna teamo deziras starigi lokan elsendon kaj petas konsilojn de jam ekzistantaj stacioj. Klub-estro: Muhammad Umar Farooq Raja, PakEsA Esperanto Radio-Klubo, Al-Markaz, Al-Markaz Road, PK-49600 Jhelum, Pakistano; ☎ +92/541/622-253; ☎ 621-444 aŭ 620-455.

2. Esperanto-Klubo "La Espero" jam aĉetis la aparataron kaj provelsendas loke. Deziras ankaŭ starigi kurtondan elsendon. Bonvenigas ĉian materialon por la programoj. Sendu al: Julie Nicole Andriatsarafara, 1er ét. Lot II. N. 56bis Analamahitsy, MG-101 Antananarivo, Madagaskaro.

3. Alain Fagot lanĉis en Grenoble (Francio) la programon "Esperanta kroniko", ĉiumarde je 13:00 ĉe la loka radio Brume Horizons (90.8 MHz FM). Dokumentojn, informojn, kasedojn sendu al Radio Brume Horizons, Chronique Espéranto, 139 rue de la Piscine, FR-38400 St. Martin d'Hères, CEDEX 1, Francio; ☎ +33/4/76-44-33-33; ☎ 76-70-23-19; ✉ brume@brume.org (indiku: Chron. Espéranto).

Ondoj tra l' mondo

• Muziksalutoj tra Radio Vieno

Radio Aŭstria Internacia disaŭdigas muzikajn salutojn sabate je 14:05, 19:30 kaj 23:05 kaj dimanĉe je 03:05, 08:30 kaj 13:05 UTC. Unu monaton antaŭ la dezirata elsendotago sciigu viajn nomon kaj adreson, la tekston de via saluto, la deziratan muzikaĵon kaj unu rezervan deziron, la celatan elsendodaton kaj unu rezervan daton, al: Radio Aŭstria Internacia, Esperanto, AT-1136 Wien, Aŭstrio; ☎+43/1/87878-3630; ✉info@rai.ping.at; TTT-paĝo: http://www.orf.at/rai/es/es_home.htm.

• Romo sendu satelite

RAI Internacia (Romo) nun uzas sateliton por disaŭdigi en Azio. Oni konsideras tiel sendi ankaŭ la E-lingvajn elsendojn, jam aŭdeblajn en Eŭropo ĉiusabate je 20:00 UTC. Petojn sendu nacilingve, itale, angle aŭ Esperante al d-ro Giovanni Celsi, RAI Internazionale, C.P. 320, IT-00187 Roma, Italio; ☎+39/6/33-54-25-26; ☎33-17-07-67.

• Konkurso Lucchetta

Memore al Girolamo Lucchetta, kunfondinto de AERA, tre aktiva ĝis sia morto la 20-an de aŭgusto 1996, Aŭskultantaro de la Trevisa Limprovinco (GAMT), kies klubano li estis, organizas konkurson de la 31-a de majo ĝis la 31-a de julio: aŭskultu kiel eble plej multajn E-staciojn kaj raportu pri ili. Por ricevi regularon ktp., skribu, aldonante respondkuponon, al: GAMT, C.P. 3 – Succursale 10, IT-31100 Treviso, Italio. (Guido Gentile, ✉g.gentile@agora.stm.it)

• Salutu Radion Havano

La E-redakcio de Radio Havano 9-jariĝos la 11-an de sept. Konfirmu vian subtenon sendante gratulkarton al: Apartado 6240, La Habana, Kubo.

• Malmö: 45 minutoj

Radio Esperanto en Malmö (Svedio) havas en 1997 tri elsendojn 15-minutajn semajne anstataŭ du: marde 18:45-19:00, ĵaŭde 14:00-14:15 kaj vendrede 14:00-14:15 (ambaŭ reelsendoj). Adreso: Narradio Malmö, Esperanto, p/a Sten Svenonius, Vendelsfridsgr. 4C, SE-21764 Malmö, Svedio; ✉sten.svenonius@mailbox.swipnet.se.

Jaroslav Mařík (1913-1997)

Honora Membro de UEA kaj de Ĉĥa Esperanto-Asocio (ĈEA), honora prezidanto de la E-ista Klubo en Prago, Jaroslav Mařík mortis la 5-an de majo. Ĉe lia enterigo, la 14-an de majo, la funebra parolado de Petro Chrdle sonis en Esperanto.

Naskita la 22-an de decembro 1913 en Zahradnice, Mařík estis unue ekde 1929 adepto de la lingvoprojekto Esperantida, sed de 1938, post eklerno de Esperanto en 1934, li senlace agadis en diversaj funkcioj movadaj. Li estis verŝajne la unua profesia esperantisto en Ĉeĥoslovakio kaj la unua profesia radio-laboristo Esperanta tutmonde: ekde 1946 li agis, apud A. Malík kaj R. Hromada, kiel redaktisto-tradukisto-parolisto de la E-elsendoj de Radio Prago — ĝis ties ĉesigo post la komunisma puĉo, en 1950.

Mařík servis kiel sekretario de E-Asocio en Ĉeĥoslovaka Respubliko inter 1948 kaj 1952, ĝis la asocio devis malfondiĝi. En 1950 li estis unu el la kvar ĉeĥoslovakaj UEA-komitatoj. Kiel multjara prezidanto de la Praga E-klubo li estis ekde la 50-aj jaroj ofte molestata de la ŝtata sekreta polico, kaj li ricevis la malgajan taskon likvidi la klubon kaj transdoni ĉiun ĝian posedaĵon. Sed jam de 1955 Mařík estis "ĉefdelegito de la E-Junularo" kaj ties reprezentanto ĉe la Tutŝtata Konsulta Komitato E-ista ĝis ties ĉesigo (1955-57). En 1957 li redaktis la junularan gazeton *Tagiĝo*. Post 17 jaroj sen memstara E-asocio en la lando, estis Mařík kiu en 1969 subskribis la statuton de nova Ĉĥa E-Asocio, kies estrarano li restis ĝis 1977. Ĝis la sama jaro li estis redakciano de la ĈEA-organo *Starto*. Kiam la Praga klubo

restariĝis, li vigle reaktiviĝis ankaŭ tie kaj restis kolono de la klubo ĝis sia subita forpaso.

Jaroslav Mařík kompilis biografiojn kaj bibliografiojn, tradukis beletrajn kaj aliajn verkojn, multjare membris en la lingva komisiono kaj vortara sekcio de la landa asocio, estris ties gazetaran servon, instruis, ekzamenis en someraj E-tendaroj, redaktis gaze-

ton... Oferema kunlaboranto en multaj projektoj, li neniam strebis esti la ĉefa aŭ eĉ ununura aŭtoro. Li signifoplene kontribuis al pluraj vortaroj, al gvidlibroj kaj informiloj pri Ĉeĥoslovakio, kaj al *Poŝatlaso de la mondo* (1971); aŭtoris la Esperantan parton de plurlingvaj komerca (1948) kaj filatela (1962, 1966) manlibroj; tradukis oficialajn dokumentojn por eldono en miloj da ekz-

empleroj, i.a. la ĉeĥoslovakana konstitucion (1948) kaj dokumentojn pri lerneaj reformoj (1949, 1950); kaj vaste artikolis pri Esperanto en ĉeĥaj gazetoj. Li verkis *Resuma historio de la Esperanto-movado* (1955) kaj la interlingvistikan kronologion *Kiu kiam?* (1987). Li kontribuis al *Historio de Esperanto-movado en Ĉeĥoslovakio* (1983) de S. Kamarýt, kaj al *Esperanto en perspektivo* (1973), per ĉapitro pri la movado en Ĉeĥoslovakio.

La angla esperantisto kaj poligloto Richard Howard, vivinta dum pluraj jaroj en Prago, tre trafe nomis sian "Esperanto-paĉjon" J. Mařík "marŝanta enciklopedio". Multaj ofte ĉerpis konojn pri la Esperanto-movado de la kara "marŝanta enciklopedio": ili neniam forgesos lian viglan personecon, lian entuziasmon, lian senlacan laboremon.

Laŭ Petro Chrdle



Jaroslav Mařík en la Praga E-klubo, festante sian 80-jariĝon.

NOVAĴOJ

de la eldona fakto
de UEA

LIBRO DE MIL ZEOJ

MONUMENTE PRI ESPERANTO. Ilustrita dokumentaro pri 1044 Zamenhof/Esperanto-objektoj en 54 landoj. Hugo Röllinger. Red. Thomas Bormann. Rotterdam: UEA, 1997. 111 p. 86 fotoj kaj pluraj tabeloj. ISBN 92 9017 051 4. 24cm. Prezo: 18,00 gld.

Post 30-jara laborado de Hugo Röllinger aperis ĉe UEA la libro *MONUMENTE PRI ESPERANTO*. Kiel komisiito de UEA Röllinger kolektis informojn pri ĉiuspecaj ZEOj, t.e. Zamenhof/Esperanto-objektoj: stratoj, placoj, parkoj, pontoj, konstruaĵoj, skulptaĵoj, ŝipoj, eĉ asteroidoj. Entute li registris 1044 ZEOjn en 54 landoj de ĉiuj 5 kontinentoj. Tio postulis de li ne nur zorgan administradon sed ankaŭ multe da persistemo, intuicio kaj detektiva kapablo, dank' al kiuj la nuna dokumentaro estas kompleta registro de ZEOj de la jarcento 1896-1996. *MONUMENTE PRI ESPERANTO* enhavas, krom laŭlanda listo de la ZEOj kun indiko pri iliaj loko kaj jaro de ekesto, ankaŭ artikolojn, en kiuj la aŭtoro rakontas kolorplenajn historiojn de multaj el ili. La 111-paĝan abunde ilustritan libron redaktis Thomas Bormann.



LA PLEJ POPULARA LERNOLIBRO EN NOVA VESTO

SALUTON! ESPERANTO AŬTODIDAKTE. Audrey Childs-Mee (1926-90). Rotterdam: UEA 1996 (6-a eld.). 194+40 p. ISBN 92 9017 050 6. 21 cm. Ilustrita de Stano Marček. Prezo: 24,00 gld.

Audrey Childs-Mee estis unu el la plej popularaj instruistoj de Esperanto. Tiu ĉi rektmetoda lernolibro rezultas el ŝiaj spertoj pri instruado en multaj landoj. *SALUTON! ESPERANTO AŬTODIDAKTE* taŭgas por uzo en memlernado kaj kursoj. De pli ol dek jaroj ĝi estas la plej populara internacia lernolibro de Esperanto. Ĝia sesa eldono aperis kun gaja plenkolora kovrilo.

 **Sonkasedo estas aparte havebla. Prezo: 12,00 gld.**

KAJ PLIE...

INTERNACIAJ EKZAMENOJ DE UEA/ILEI. Gvidilo por prepariĝi al la elementa kaj meza niveloj. Represo. 36 p. Prezo: 4,80 gld.

POLITIKA HEGEMONIO KAJ LINGVA HEGEMONIO EN EŬROPO. A. Chiti-Batelli, P. Janton. Propono por la eŭropa strategio de la Esperanto-movado. Esperanto-Dokumento n-ro 33E. 19 p. Prezo: 4,80 gld.

SENĜENAJ DIALOGOJ. Alberto Fernández. UEA fariĝis la ĉefdistribuanto de tiu ĉi fascine verkita kaj riĉe ilustrita libro pri la fundamentaj natursciencaj demandoj. 197 p. Prezo: 18,00 gld.

ZAMENHOF, BILDRAKONTE. G. Tilleux, B. Disano, J.M. Derzelle. UEA estas nun distribuanto ankaŭ de jena plurkolora bildstria biografio de Zamenhof. Grandformata. 18p. Prezo: 15,00 gld.

TRIONA RABATO EKDE 3 EKZ. DE SAMA TITOLO ĈE LA LIBROSERVO DE UEA.

Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando
Telefono: +31 10 436 1044 Telefakso: +31 10 436 1751 Retpoŝto: <uea@inter.nl.net>

La filmo

SPUROJ DE LA AVO

(60,00 gld. ĉe la Libroservo de UEA)

montras lokojn ligitajn kun la Zamenhof-biografio. Ĝia profito estas destinita por la rekonstruo de la naskiĝdomo en Bjalistoko.

Sábz Ándišan

Esplor-aplikada instituto pri internacia lingvo Esperanto



سبزاندیشان

شماره ثبت: ۹۰۸۵

کانون پژوهشی و کاربرد زبان بین‌المللی اسپرانتو

Subtenas disvastigon de Esperanto tra Irano. Okazigas E-kursojn diversegrade en kultur-centroj. Aranĝas E-renkontigojn. Funkcias kiel Esperanta informcentro. Eldonas E-librojn. Malferma centro por ĉiuj amikoj de Esperanto. Kontakt-adresoj:

Poŝte: P.O.Kesto: 17765-184, Tehrano. Tel.&Fakso: 0098 21 6626913

Fondaĵo Canuto

Multaj arde deziras membriĝi en UEA, sed ne ĉiuj povas. Via donaco al Fondaĵo Canuto helpas nin teni la kontaktojn kun tiuj, kiuj suferas pro transpagaj baroj. Antaŭdankon pro via solidareco!

La plej granda en la mondo!



LIBROSERVO DE UEA

Stokas ĉiun haveblan Esperanto-libron • Rabatas ekde tri ekzempleroj • Sendokostoj nur 10% • Rapida servo

LA PLEJ KONATA LIBRO PRI EKA TEMPOUZO, NUN EN ESPERANTO!

Lothar J. Seiwert:

La aboco de tempoplanado



Roterdamo: UEA 1995. Serio Konsilaroj por Aktivuloj n-ro 2. 53 p. Prezo: 7,50 gld. Triona rabato ekde 3 ekz.

Jen la plej

vaste legata junulara gazeto rekomendinda por komencantoj bela kaj moderna diversa kaj amuza interesa por ĉiuj

KŬIAKTO

estas gazeto por ĉiu kiu serĉas interesan legaĵon en Esperanto. Ĉiu numero havas ankaŭ tekstojn en tre facila lingvo, tiel ke **KŬIAKTO** estas aparte taŭga por komencantoj kaj por Esperanto-kursoj. Krome, konkurso atendas vin en ĉiu numero de la revuo! En 1997 **KŬIAKTO** aperos 6-foje. Abonu rekte de UEA aŭ ĉe via kotizperanto.



ABONTARIFO 1997

Aŭstralio	28 dolaroj	Francio	120 frankoj	Nederlando	38 guldenoj
Aŭstrio	240 ŝilingoj	Germanio	34 markoj	Norvegio	140 kronoj
Belgio	700 frankoj	Hispanio	2100 pesetoj	Pollando	20 guldenoj
Brazilo	20 guldenoj	Israelo	29 guldenoj	Portugallio	2400 eskudoj
Britio	15 pundoj	Italio	31000 liroj	Svedio	150 kronoj
Danio	130 kronoj	Japanio	2600 enoj	Svislando	28 frankoj
Finnlando	100 markoj	Kanado	29 dolaroj	Usono	22 dolaroj

Granda rabato por grupaj abonoj ekde ses ekzempleroj. Informiĝu!

Malta Esperanto-Societo invitas vin partopreni en la **SESA INTERNACIA TURISMA SEMAJNO EN MALTO** de la 3-a ĝis la 9-a de septembro 1997.

Prospektoj kaj aliĝiloj haveblaj ĉe:

Malta Esperanto-Societo,
P.O. Box 142, Valletta CMR 01, MALTA.

Eventoj

Spiralbinditaj jarkolektoj, 1992-96, nur kelkaj ekzempleroj! 40 NLG/jaro. Redakcio: pk.87, HU-1675 Budapest, Hungario.

Dua, pliampleksigita eldono de dudirekta vortaro de grava afrika lingvo, fare de renoma lingvisto.

JAN KNAPPERT

Vortaro
Esperanto-Suahila

Kamusi
Kiesperanto Kiswahili

Eldonis UEA, 1996. 16+158p.
Prezo: 18,00 gld. Triona rabato.

